

EL POPOLA ĈINIO

中國新道

6

1999

ISSN 0032 - 4361

A black and white photograph of two young children standing and facing each other. The child on the left is wearing a light-colored, patterned sweater and dark pants. The child on the right is wearing a dark vest over a light-colored long-sleeved shirt and dark pants. They appear to be in an outdoor setting with a blurred background.

**Kreski kun
ludiloj**

**Interesaj ciferoj en
la ĉina lingvo**

**Proksimiĝi al
Meili-neĝmonto**



Ankro kaj reto ripozas post laborriĉa vivo

de HANS FECHLER (Germanio)

En junio oni festas la Internacian Infanan Tagon. Okaze de tio, ni publikigas raportojn, kiuj helpas niajn legantojn koni la vivon de ĉinaj infanoj. La Infana Tago estas grava festo por ĉinaj infanoj — en tiu tago infanaj organizoj kaj elementaj lernejoj aranĝas interesajn aktivadojn kaj amaskomunikiloj prezentas koncernajn raportojn. Tio celas ne nur festi tiun tagon, sed ankaŭ vekti la atenton kaj helpon de la tuta socio al la infanoj.

Ekde ĉi tiu numero ni aperigas serion da raportoj "Serĉo de Shangrila", kiu gvidos niajn legantojn eniri Diqing-altebenaĵon en la suda parto de Ĉinio, ĝui tie la belajn neĝmontojn, senlimajn stepojn kaj maron da floroj kaj rigardi originalajn morojn de tibet-nacianoj, misterajn valojn kaj templojn. Dum multaj jaroj oni serĉadis la sanktan kaj misteran lokon.

Kian alian utilon havas la cifero krom kalkuli? Leginda estas la artikolo "Interesaj ciferoj en la ĉina lingvo", kiu rakontas specifajn funkciojn de ciferoj en la ĉina lingvo.

1999 estas la 50-jara jubileo de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. 50-jariĝas ankaŭ la ĉina eldonado en pluraj fremdaj lingvoj. Tiuj eldonaĵoj konigas Ĉinion al la tuta mondo kaj helpas interŝanĝon kaj amikiĝon inter Ĉinio kaj diversaj landoj. Al tio kontribuas ankaŭ nia revuo "El Popola Ĉinio". S-ro Zhang Qicheng, unu el la fondintoj de EPC kaj ĝia eksa ĉefredaktoro, verkis artikolon por rememori la fondiĝon de EPC kaj ĝian iritan vojon.

La Red.

El Popola Ĉinio

6 [489] 1999



Kaŝa diskuto

Foto de Li Changjiang

La infanoj estas tre dorlotataj de la gepatroj, kiuj ĉiam plenumas iliajn petojn kaj helpas iliajn aferojn. Tamen la infanoj havas sian mondon, kiu ne akceptas la plenkreskulojn. Jen ili renkontiĝas surstrate. Unu haste ion diras kaj la alia atente aŭskultas. Ja estas grava afero, kiu povas esti diskutata nur inter infanoj.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso: +86-10-6832 1808

Retpoŝto:


epc@china-report.com

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/EIPopolaCxinio>>

ENHAVO

- | | |
|--|---|
| 2 INTER NI | 29 HOMARO KAJ NATURO:
Hejmloko de grandaj pandoj |
| 4 EKONOMIE:
Eminentaj konstruistoj de Hancunhe; Kurantaj aferoj | 32 Zhongguancun — elektrona strato |
| 6 El Popola Ĉinio kaj la Ĉina Fremdlingva Eldona kaj Distribua Buroo | 35 Urbo de legemuloj |
| 8 Diskuti ĉi tie, pri tutmondiĝo kaj paco | 36 JUNULARO:
Kiam Oriento renkontas Okcidenton... |
| 9 ESP-NOVAĴOJ | 38 EL ĈINAJ GAZETOJ |
| 10 En tagoj kun japanaj esperantistoj (IV) | 40 MULTNACIA ĈINIO:
Vizito en la regiono de la ĉinaj kore-nacianoj |
| 13 ORIGINALE VERKITAJ:
Al geamikoj esperantistaj | 42 Interesaj ciferoj en la ĉina lingvo |
| 14 ĈINAJ E-ISTOJ:
Mi komercas per Esperanto | 44 Landlima urbeto Erenhot |
| 16 TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:
Pli bona vivmaniero | 46 Kreski kun ludiloj |
| 17 Maljunuloj de Ĉinio | 48 Medito ĉe finiĝo de la 20-a jarcento |
| 20 SERĈO DE SHANGRILA:
Proksimiĝi al Meili-neĝmonto | 50 Respektata doktorino |
| 24 NUNTEMPA BELARTO:
Pentraĵo — esprimo de amo en la koro | 51 ĈINAJ METIARTAĴOJ:
Ora sonorilo |
| 28 POR KOMENCANTOJ:
Kie la mono plej valoras? | 2 FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ:
Ankro kaj reto ripozas post laborriĉa vivo |
| | SUR LA DORSKOVRILO:
Kiosko |



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|-----------------------------|--------------------|
| 1. Zhongdian (p. 20) | 4. Yanbian (p. 40) |
| 2. Sichuan-provinco (p. 29) | 5. Xi'an (p. 13) |
| 3. Erenhot (p. 44) | |



Eminentaj konstruitoj de Hancunhe

de FANG SHAN

ANTAŬ nelonge mi veturis al Hancunhe-vilaĝo en antaŭurbo de Pekino. Gvidate de la vilaĝestro, mi piediris al la grenkampo. Tie mi vidis 70 grandajn forcejojn el plasta membrano. Ja estis sezono de reverdiĝo de tritiko semita en la pasinta jaro, sed la 30 terkulturistoj atentis ĉefe kulturadon en la forcejoj. En iu grandega forcejo mi vidis ruĝan miniaturan tomaton enkondukitan el Izraelio.

Mi forlasis la grenkampon. Mia aŭto kuregis sur ebena asfaltita vojo kaj post nelonge atingis la Instruan Centron konstruitan per 25 milionoj da juanoj. Tio estas 4-etaĝa domo kun infanĝardeno, elementa lernejo, mezlernejo, laborista gimnazio kaj instituto. En iu klasĉambro estas 20 komputiloj.

En la loĝkvartalo de la vilaĝo staras 578 duetaĝaj domoj. Tie loĝas la vilaĝanoj de Hancunhe. Mi eniris en la hejmon de Li Dejiang. Lia domo konsistas el salono, dormejoj, kuirejo, manĝejo k.a. Banejo troviĝas en ĉiu etaĝo. En lia hejmo estas ledaj sofoj, hejmaj elektraj aparatoj, kiaj televidilo, video-aŭdia aparato, faksimila telefono, mikroonda forno, elektra marmito, fridujo kaj klimatizilo. En la hejmo estas ankaŭ kranakvo kaj radiatoro. El tio vidiĝas, ke la vilaĝanoj vivas vivon kompare bonan en norda Ĉinio.

Kiamaniere la vilaĝo bonhaviĝis? Pri tio la vilaĝestro emfazis la historion de domkonstruado. Antaŭe, samkiel aliaj ĉinaj vilaĝoj, Hancunhe estis malriĉa. Ĉu ĝia ekonomio povis rapide disvolviĝi? Dank' al la reformado kaj pordmalfermo, la Hancunhe-anoj rimarkis sian avantaĝon: en la vilaĝo estas multe da masonistoj. 30 el ili formis konstruan grupon kaj veturis en la urbon por domkonstruado.

Laŭ kutima opinio kamparaj masonistoj taŭgas nur por fari kokneston, porkstalon aŭ maksimume kabanojn. Sed ekster ĉies atendo tiuj masonistoj lernis multe en la urbo kaj konstruis altan hotelon modernan kaj antikvagustan. De tiam inaŭguriĝis la granda kariero de la 30 masonistoj.

Forpasis 20 jaroj kaj la konstrua grupo nun havas pli ol 30 000 personojn. Ili fondis Ĝeneralan Konstruan Kompanion (grupo) Hancunhe kun 22 kompanioj kaj fiksa kapitalo de 450 milionoj da juanoj. Nun ĝi estas la unuaklasa konstrua kompanio (grupo) kaj modelo de kamparanaj entreprenoj. En pluraj konstruejoj de Pekino vidiĝas la ŝildo kun la nomo Hancunhe. Kun disvolviĝo de la kolektiva ekonomio, la totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo de la vilaĝo en 1998 atingis 1.13 miliardojn da juanoj, sed en 1978 ĝi estis nur 910 000 juanoj. La konstruistaj kompanioj ludas ĉefan rolon en la vilaĝa ekonomio, kaj krome, en la vilaĝo aperis fabrikoj de ŝtalaj tuboj kaj alumina aloj. La vilaĝo asignas parton



Novaj loĝdomoj de vilaĝanoj

de la enspezo de la konstruado al la vilaĝanoj kaj la grandan parton al la komunaj bonstatigaj aferoj kaj aliaj entreprenoj. Oni konstruis en la vilaĝo hotelon, kinejon, turisman agentejon, komercan centron, naĝejon, akvan parkon k.a. En 1998 la jara enspezo de ĉiu vilaĝano estis 7 600 juanoj kaj la averaĝa ŝparkaso de ĉiuj familioj superis 20 000 juanojn. Mi demandis

la vilaĝestron: "Kio estas la maksimuma kaj minimuma enspezo de la vilaĝanoj?" Li respondis: "La minimuma jara enspezo estis 6 000 juanoj, dum la maksimuma — 200 000 juanoj. Teknikistoj kaj direktoroj enspezas multe. Ĉi-kampe ni observas la principon: Permesi al parto da homoj riĉiĝi unue kaj poste ĉiuj homoj suriros la vojon de komuna riĉiĝo." ■

KURANTAJ AFEROJ

● La 10 grandaj komercaj kompanoj de Ĉinio en 1998 (kalkulate laŭ doganaj regionoj) havis kompare grandan ŝanĝiĝon en la vico kompare kun 1997. La lokoj de la Sudorienta Azio malleviĝis dum tiuj de eŭropaj kaj amerikaj landoj levigis. Juĝate laŭ la komerca valoro ili estas: Japanio, Usono, Eŭropa Unio, la Speciala Administra Regiono Hongkong, Sudorient-azia Komunumo, Korea Respubliko, Taiwan-provinco, Rusio, Aŭstralio kaj Kanado. En 1998 la totala valoro de importoj kaj eksportoj kun tiuj landoj estis 278.24 miliardoj da usonaj dolaroj, kiuj konsistigas 88.7% de tiuj de Ĉinio en la tuto.

● En 1998 Ĉinion vizitis multaj eksterlandanoj, kiuj atingis 63.478 milionojn da homoj, je 10.23% pli multe ol tiuj en 1997. En 1998 Ĉinio gajnis 12.602 miliardojn da usonaj dolaroj el turismaj aferoj. Ĉi-kampe ĝi okupas la 7-an lokon en la mondo kaj la unuaj 6 lokoj estis okupitaj de Usono,

Italio, Francio, Hispanio, Britio kaj Germanio.

● Ĉinio konstruis sian unuan ŝipon por likvigitaj etileno kun ka-



Allilandaj turistoj bicikle vojaĝantaj en Ĉinio

pacito de 22 000 kubmetroj. Oni diris, ke tio estas la plej granda etileno-likvaĝa ŝipo en la mondo. Antaŭ nelonge ĝi estis surakvigita.

● Antaŭ nelonge, post Rusio, Francio, Japanio kaj Usono Ĉinio difinis sian marfundan min-ekspluatatan regionon, kiu ampleksas 75 000 kvadratajn kilometrojn egale al la areo de Bohai-mar. Laŭ la nunaj teknikaj kondiĉoj de Ĉinio tiu regiono estas taŭga por ekspluato en 20 jaroj kaj ĝia jara ekspluata kvanto de metalaj tuberoj estos 3 milionoj da tunoj. Tio iagrade mildigos la streĉitecon de la bezono de Ĉinio je raraj metaloj en la 21-a jc.

● En 1998 Ĉinio emisiis sociajn bonstatigajn loteriajn biletojn je 11 miliardoj da juanoj en la tuto per du manieroj: A. aktuala premio, t.e. tuja premiado. B. publikigo de la premio per TV-elsendo. Per la kolektita mono Ĉinio jam fondis kaj helpis 69 000 bonstatigajn establaĵojn.

El Popola Ĉinio kaj la Ĉina Fremdlingva Eldona kaj Distribuata Buroo

de ZHANG QICHENG

NIA popola respubliko naskiĝis en 1949. En tiu jaro fondiĝis ankaŭ la Ĉina Fremdlingva Eldona kaj Distribuata Buroo. Ĉi-jare estos la 50-a datreveno de la naskiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kaj ankaŭ la 50-a datreveno de la fondiĝo de la buroo.

Efektive, jam antaŭ la naskiĝo de la nova Ĉinio

komenciĝis la preparado por fondi fremdlingvan eldonan kaj distribuatan buroon. Tiam fama raportisto Liu Zunqi respondecis pri tiu laboro. Ĉar la buroo estis destinita por eldoni librojn kaj revuojn en diversaj fremdaj lingvoj, s-ro Liu donis grandan atenton al varbo de tradukistoj. Mi ja ne estis kapabla je fremda lingvo, tamen mi aliĝis al la personaro de la buroo kiel redaktoro. Delonge mi estas esperantisto kaj jam en la 30-aj jaroj faris iujn laborojn per Espe-

ranto inspirate de la slogano "Per Esperanto por la liberigo de Ĉinio". Tiam mi kredis, ke post naskiĝo de la nova Ĉinio Esperanto-movado certe rapide disvolviĝos kaj Esperanto ludos gravan rolon. Do, post kiam mi eklaboris en la buroo, tute nature venis al mi ideo fari eldonadon en Esperanto. Antaŭ ĉio mi volis eldoni Esperantan revuon por raporti ĉinajn aferojn al alilandaj legantoj. Subtenate de la altprestiga veterana esperantisto s-ro Hujucz, mi letere proponis tion al s-ro Liu Zunqi. Liu konsultis s-ron Hu Qiaomu, altrangan funkciulon en ĉina eldona instanco. Jam en la 30-aj jaroj Hu Qiaomu konatiĝis kun mi kaj aliaj esperantistoj kaj havis profundan konon pri nia lingvo. Dank' al liaj favoraj opinioj pri Esperanto kaj Esperantaj laboroj, s-ro Liu Zunqi akceptis mian proponon. Tiel nia revuo El Popola Ĉinio naskiĝis



Laborantoj de EPĈ-redakcio en la sporta kunveno de la Ĉina Fremdlingva Eldona kaj Distribuata Buroo

maje de 1950.

Nelonge post naskiĝo de nia revuo ni publikigis rakonton "Almozulo fariĝas distriktestro" tradukitan el iu anglalingva revuo. Baldaŭ ni ricevis leteron de bulgara samideano, kiu skribis, ke lin tre interesis la artikolo kaj pro tio li tradukis ĝin en la bulgaran lingvon kaj publikigis ĝin en aŭtoritata bulgara ĵurnalo. Tio ege ĝojigis nin, ĉar tio montris almenaŭ, ke Esperanto iagrade povas ludi pli gravan rolon ol la angla lingvo.


Ĉe sia naskiĝo nia redakcio anoncis, ke alilandaj legantoj povos utiligi la materialojn en nia revuo, kondiĉe ke tiuj montru la originon kaj informu nin pri la publikigo. Tial en la pasintaj jardekoj multaj el niaj legantoj tradukis niajn artikolojn kaj publikigis ilin en sialandaj ĵurnaloj kaj revuoj kaj krome helpis iujn revuojn fari utilajn aktivadojn. En la pasinta jaro bulgara leganto skribis al ni, ke li tradukis la artikolon de nia revuo "Gajaj kanceruloj" en la bulgaran lingvon kaj publikigis ĝin en la bulgara pensiula gazeto "Tria Aĝo" kaj diris, ke ekde la venonta numero la redakcio de "Tria Aĝo" kondukos la aktivadon "kunvivado kuracas" laŭ materialoj publikigitaj de nia revuo.

Krom tio, la legantoj utiligas la materialojn de nia revuo alimaniere. Ili cirkuligis nian revuon inter membroj de E-societo, kolektive legis ĝin, prenis artikolojn de la revuo kiel lernomaterialojn en E-kursoj aŭ montris ĝin en ekspozicioj... Unuvorte, ili volas ĉiamaniere montri El Popola Ĉinio al pli da homoj.

El Popola Ĉinio estis multe ŝatata de la esperantistoj precipe de tiuj en Sovetunio kaj Orienta Eŭropo en la komenca periodo. Ili alte taksis nian revuon kaj profunde amis ĝin, kio estis tute ekster nia atendo. Rusa leganto skribis al ni, ke nia revuo konigas la tutan homaron pri la vivo de la granda ĉina popolo surbaze de la vera internacia ŝtarpunkto.

Multaj el niaj pollandaj, ĉeĥaj, bulgaraj, jugoslavaj kaj hungaraj legantoj diris, ke El Popola Ĉinio estas la ĉefa kanalo por ilia konado de Ĉinio, ĉar la tieaj gazetaraj malofte raportis pri Ĉinio. Ĝenerala sekretario de Hungara E-asocio letere esprimis sian dankon al ni kaj deziris al nia revuo pli grandan sukceson.

Kompreneble, El Popola Ĉinio estas legata ne nur en Rusio kaj Orienta Eŭropo, ĝiaj fervoraj legantoj troviĝas ankaŭ en Okcidenta kaj Norda Eŭropo, Nor-



Novaj Esperantaj eldonaĵoj en Ĉinio

da Ameriko, Latin-ameriko, Japanio kaj aliaj aziaj landoj. En UK de ĉiu jaro, ni okazigas kunsidon de EPC-legantoj kaj ĉiufoje la atmosfero de la kunsido estas tre varma kaj la kunveno estas plenplena kaj multaj el la gastoj venis el la landoj ekster Orienta Eŭropo. Ĉiufoje la kunsido forte kuraĝigas niajn laborantojn kaj ili sentas grandan feliĉon kaj honoron.

Fine mi devas montri mian dankon al la belga samideano Charles Ghiselin, kiu faris testamenton por heredigi sian bienon al El Popola Ĉinio cele al disvolvo de Esperanto. El tio ni vidis, kiom varme li amis Esperanton kaj nian revuon El Popola Ĉinio.

Okaze de la 50-a datreveno de la naskiĝo de la Ĉina Fremdlingva Eldona kaj Distribua Buroo, kiu dum duonjarcento kreis kelkajn fremdlingvajn revuojn kaj eldonis milojn da specoj da libroj en ĉefaj lingvoj de la mondo, mi volas esprimi al ĝi ne nur gratulon, sed ankaŭ mian koran dankon, ĉar mi opinias, ke se ne estus la Ĉina Fremdlingva Eldona kaj Distribua Buroo, ne estus El Popola Ĉinio. Apartan dankon mi volas diri precipe al ĝiaj estroj pro ilia forta subteno. Ĉar, nur dank' al ilia subteno, EPC povas daŭre aperi kaj fariĝi pli kaj pli kontentiga por la legantoj. Estas menciinde ke ĝiaj estroj Liu Zunqi, Luo Jun, Yang Zhengquan kaj aliaj eĉ fariĝis membroj de la ĉina societo "Amikoj de Esperanto". ■

Diskuti ĉi tie, pri tutmondiĝo kaj paco

DE la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto, en Berlino okazos la 84-a Universala Kongreso de Esperanto. Frue ĝis la 31-a de januaro, al ĝi aliĝis 1 830 personoj el 54 landoj.

Kiam, Berlino festis en 1987 sian 750-an naskiĝtagon, la urbo spertis du solenaĵojn, unu en la okcidento kaj la alian en la oriento, kaj inter ambaŭ oficiale okazis neniun kontakto dum tiu festo. Nur du jarojn poste, la muro disdividinta la festantojn, falis, kaj Berlino ekvidis sian ĝis nun lastan epizodon: tiun de la nova, reunuiginta ĉefurbo.

Kvankam en malnovaj dokumentoj la "duobla urbo" Berlino kaj Coella unuafoje estis menciita en 1237, ĝi verŝajne ekzistas iom pli longe. Rapide ĝi kreskis al komerca kaj merkata loko. En la 17-a jarcento, sub la regado de princo Frederiko Vilhelmo, la urbo spertis antaŭe ne viditan ekonomian kaj kulturalan prosperon.

En la fino de la 19-a jarcento (depost 1871), Berlino fariĝis la ĉefurbo de Germanio, kaj en 1900 vivis ĉi tie jam du milionoj da homoj.

En 1920 la "Granda Berlino" estis formita, kunmetita el sep urboj, 59 vilaĝoj kaj 27 bienaj distriktoj.

Evidente estas la detruo de la du mondmilitoj al ne nur la berlinanoj. Kaj la posta tiel nomata "malvarma milito" postlasis la faman muron 165 kilometrojn longan ĉirkaŭ la okcidenta parto de la urbo. Nun la "muro" videblas nur en kelkaj lokoj, memorige, kaj por turistoj; la homoj miksiĝas, kvankam la diferencaj vivospertoj en la iamaj

du partoj de la urbo ankoraŭ longe havos efikojn.

La mezo de Berlino dum la 30-aj jaroj estis la placo Potsdamer Platz. Ĝi estis la placo kun la plej densa trafiko en Eŭropo, kaj sur ĝi staris la unuaj trafiklumoj. Dum la ekzisto de du germanaj ŝtatoj, ĝi dezertiĝis. Post la reunuigo de la urbo, estis vokitaj la plej famaj arkitektoj de la mondo, por denove havigi al Potsdamer Platz gravecon kaj lokon en la nova berlina centro. La Universala Kongreso trafos al bona tempo, ĉar multaj konstruaĵoj de la placo estos finkonstruitaj, kaj la unua vivo sperteblos. Pli okcidente, proksime de la lago Halensee estas nia kongresejo.

De multaj lokoj en la urbo videblas la 365 metrojn alta televidturo sur la placo Aleksanderplatz, kie vi ankoraŭ renkontos la "ĉarm" de la socialisma arkitekturo. Tamen Berlino ne nur konsistas el ŝtonoj kaj brikoj. Tute kontraŭe: ĝi estas la plej verda urbo de Ger-

manio. En neniun alia urbo troviĝas tiom da enurbaj arbaroj, parkoj kaj lagoj. Preskaŭ triono de Berlino estas verdo kaj akvo.

La urbo posedas okdek muzeojn, tri operejojn, plurajn koncertejojn kaj multajn aliajn interesajn lokojn por turistoj.

Frue en 1903, en Berlino fondiĝis la unua esperantista grupo. La preskaŭ centjara historio de la Esperanto-movado de Berlino estis forte ligita al la politika kaj kultura evoluo de la urbo. Hodiaŭ pluraj grupoj, diskonigaj iniciativoj kaj kursoj konsistigas la vervan esperantistan vivon en la germana ĉefurbo.

La temo de la kongreso "Tutmondiĝo: ŝancoj por paco?" certe en neniun alia loko estas pli taŭga por diskuto ol ĉi tie: pro la historio de Berlino kaj pro ĝia geografia situo, en la koro de Eŭropo, ĉe la iama limo inter la politikaj oriento kaj okcidento. ■

El la "Unua Bulteno" de la 84-a UK

Konstruaĵoj en Berlino



ĈINIO

● Ekde junio de 1998, esperantistoj en Kantono organizas regulan ago-tagon por altigi la lingvonivelon kaj vigligi la Esperantan movadon. Pro tio ili eldonas malgrandan gazeton "Agadu", kiu prezentas ilian ago-tagon kaj verkaĵojn de diversnivelaĵ esperantistoj. Ili deziras, ke la gazeto fariĝu ligilo de en- kaj eksterlandaj esperantistoj. Retadreso: <Agadu@esperanto.nu>

● La 5-an de januaro 1999, la poŝtmarko-serio pri leporo estis emisiita de la Ministerio de Informa Tekniko kaj Telekomunika Industrio de Ĉinio. Samtage la Filatela Kompanio de Haikou, Hainan-provinco, kaj tiu de Changshu, Jiangsu-provinco, ekuzis la lokan poŝtstampilon en la ĉina lingvo kaj Esperanto. La poŝtstampoj estis desegnitaj de Zhang Linrui.



Poŝtstampo kun vortoj en la ĉina lingvo kaj Esperanto eldonita de la Changshu-a Filatela Kompanio

● Je la 18-a de marto 1999, fondiĝis la Xi'an-a Esperanta Klubo. La fondkunveno okazis en la ĉambrego de la kultura kompanio Zhiyuan de Xi'an. Partoprenis pli ol dudek esperantistoj el diversaj kvartaloj de Xi'an. S-ro Qiu Shi, esperantisto kaj direktoro de tiu kultura kompanio, donis varman parolon. La ĉeestantoj diskutis kiel bone disvastigi kaj apiliki Esperanton. Ili opiniis, ke plej grave estas prak-

tiki Esperanton. Xi'an estas fama urbo kun multaj historiaj vindindaĵoj, kiuj allogas multajn samideanojn. Gravas ankaŭ helpi tiujn vizitantojn. Fine ili ellaboris planon de lernado de Esperanto kaj elektis la estraron de la klubo. Adr.: Qiu Shi, Xi'an-a Esperanta Klubo, 221-Nr. 29, Huannanlu Xiduan, CN-710068, Xi'an, Ĉinio.

BRAZILO

● Por helpi pliaktivigi la denaskismon en Sudameriko, estis fondita Rondo Familia Sudameriko. Ĝia celo estas aranĝi regionajn renkontiĝojn por la E-familioj de la kontinento, provizi ilin per klarigoj, sugestoj kaj apogo kadre de la edukado kaj instruado de la infanoj. Ĉiuj paroj, kiuj loĝas en Sudameriko, kaj kiuj uzas Esperanton inter si, aŭ en kiuj unu el la partneroj estas neesperantisto, aŭ familioj kun infanoj en kiuj oni, prefere denaske, instruas Esperanton al la infanoj, estas invitataj kontakti nin por pliaj informoj. Jam disponeblas nia bulteno "Denaskulo", kiun ni sendos senpage al ĉiuj, kiuj kontaktos Rondon Familian Sudamerikon. Por membriĝi, aŭ nur por ricevi pliajn informojn, bv. kontakti nin ĉe nia retadreso. Ni volonte akceptas kunlaborantojn. Flavio Cimonari Rebello, <rondofamilia.sud@zipmail.com.br>. (Flavio Cimonari Rebello, Retinfo)

ĈEĤIO

● La Esperanto-Klubo en Trebiĉ aranĝas Someran Esperanto-Tendaron (SET). Ĝi okazas en tri etapoj, en la tradicia loko ĉe la digolago de Vranov, apud la vilaĝo Lančov, distrikto Znojmo, en suda Moravio. La instruado de Esperanto okazas ĉiutage krom dimanĉo de la 8-a ĝis la 12-a horo en tri diversgradaj kursoj: A — por komencantoj, 4.7.-17.7.1999;

B — por progresintoj, 18.7.-31.7.1999; C — konversacia, 1.8.-14.8.1999. Por ricevi necesajn informojn skribu al: Esperanto-Klubo, CZ-674 01 Trebiĉ, Ĉeĥio. (Drahomir Kocvara)

HUNGARIO

● En la 20-a de januaro 1999, 31 gestudentoj sukcese trapasis studfinan Esperanto-ekzamenon en KLTE (Scienca Universitato "Lajos Kossuth") en Debrecen, Hungario. La kursestro estis Tibor Papp, ekzamenis d-ro Jozsef Szabo kaj la kursestro, la E-kurso estos anoncita ankaŭ por la dua semestro en 1999.

(Tibor Papp)

NEDERLANDO

● Dum la 84-a UK en Berlino okazos la Internaciaj Ekzamenoj de ILE /UEA je la elementa kaj meza niveloj. Ili konsistos el tri partoj: gramatika antaŭtesto, skriba parto kaj parola parto. Nur la sukcesintoj en la gramatika antaŭtesto rajtos partopreni la skriban parton kaj, atinginte en la skriba parto la sukceslimon de 60 poentoj, ankaŭ la parolan parton. Pro praktikaj kialoj maksimume 24 kandidatoj povos ekzameniĝi. Pro tio anticipa sinanonco estas konsilenda. Oni anoncu sin, prefere antaŭ la 1-a de julio, ĉe la sekretario de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK), Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard, Nederlando; telefono +31 72 5717918; telefakso +31 72 5747670; retpoŝto <ten.hagen.esperanto@wxs.nl>. Samtempe oni pagu la speciale favoran ekzamenkotizon (40% de la MA-kotizo en la lando de la kandidato) al la UEA-konto ilek-a aŭ rekte al la kasisto de IEK: B. Andreasson, So"dra Ro"rum pl 455, SE-242 94 Ho"rby, Svedio; poŝta ĝirkonto 682117-7 (Stockholm). (Hans ten Hagen, Ret-info)

En tagoj kun japanaj esperantistoj (IV)



La aŭtoro (meze) kaj s-ro Kobayashi Tsukasa (maldekstre) gastas ĉe prof. Abe Ken'ya.

de WANG HANPING

INTERVJUO AL PROFESORO ABE KEN'YA

S-ro Lusin, granda moderna literaturisto de Ĉinio kaj subteninto de Esperanto, iam studis medicinon en Sendai, Japanio. Lia verko pri lia anatomia instruisto "S-ro Fuĵino" estis prenita en lernolibron de ĉinaj kaj japanaj mezlernejoj. Antaŭ mia vojaĝo al Japanio mi esperis koni la postsignojn de Lusin en Sendai, krom Esperantaj interŝanĝoj. Tion pensis ankaŭ s-ro Nagase Yoshikatsu kaj zorgeme aranĝis la aferon.

En la sekvanta tago post kiam mi atingis Tokion, s-ro Kobayashi Tsukasa, esperantisto kaj verkisto, akompanis min fari intervjuon al profesoro Abe Ken'ya, fakulo pri studo de Lusin. Mi kaj s-ro

Kobayashi Tsukasa interkonatiĝis en la 85-a Japana E-kongreso. Tiam li donacis al mi la de li kompilitan manlibron pri UK kun verda kovrilo. Estis interese, ke oni povos fari verdstelan flagon, se oni detondos kvinpintan stelon el interna paĝo kaj gluos ĝin sur la verdan kovrilon. En la interkonsentita horo ni alvenis al la literatura fakultato de la universitato Toyo, tie atendis nin prof. Abe Ken'ya kaj kelkaj liaj lernantoj. En la 70-aj jaroj prof. Abe Ken'ya komencis fari enketon pri kaj kolektadon de historiaj materialoj pri Lusin dum lia studado en Sendai. Li akiris ĝojigan sukceson. Li konigis al mi sian opinion dum studado pri Lusin. Dank' al tio mi pli profunde komprenis, kial Lusin sin turnis de medicina lernado al literatura verkado.

Antaŭ la adiaŭo prof. Abe

Ken'ya petis Kobayashi kaj min rakonti iom pri Esperanto kaj E-movado al li kaj liaj lernantoj. Profitante de tiu okazo, s-ro Kobayashi Tsukasa propagandis Esperanton kaj donacis al prof. Abe Ken'ya la de li verkitan libron "Kio estas la 20-a jc. — Marx, Freud kaj Zamenhof". Mi donacis al li "Ĉina Antologio", en kiu legiĝas verkoj de Lusin. Kaj prof. Abe Ken'ya reciprokis disertaĵaron "Memore al la 90-jariĝo de lernado de Lusin en Sendai". Reveninte en Pekinon, mi revidis prof. Abe Ken'ya en televida programero pri vizito de la ĉina prezidanto Jiang Zemin en Sendai.

PARTOPRENO EN KUNLOĜADO DE KANTO

Mi pasigis mian lastan nokton en Tokio ĉe s-ro Numata Ryokiti. Tio estas esperantista familio. En la pasinta somero s-ino Nakano Humiko kaj iliaj du infanoj partoprenis en la Montpeliera UK kaj s-ro Numata Ryokiti, tre okupita pro sia laboro, nur ilin sekvis pere de interreto. Tiuvespere, en interreto ni kune ĝuis E-programerojn dissenditajn de la Pola Radio kaj la plej novan numeron de EPĈ, babilante ĝis profunda nokto.

En pluveto de la sekvanta mateno mi trajne veturis al Yatugatake por partopreni en la 18-a Kunloĝado de Esperanto-Ligo de Kanto. Irinte en Esperanto-Domon en Yatugatake, mi kvazaŭ hejmen revenis. Kiam mi atingis la domon, la aktivado jam komenciĝis. Mal-

graŭ malbona vetero, 20 esperantistoj ĉeestis la aktivadon.

Mi unue sekvis la kurson gvidatan de s-ro Reza Kheir-khah el Irano. Plurajn jarojn antaŭe li disvastigis Esperanton en suda Ĉinio kaj mi iam publikigis lian koncernan artikolon. Poste li venis en Japanion, daŭre aktivas

en E-movado kaj eldonis son-gazeton "Najtingalo". Pasintjare li partoprenis en farado de Esperanta filmo "En somera vilao". Liaj kur-

sanoj plejparte estis maljunuloj, kiuj lernis diligente kaj serioze. Kvankam ili lernis Esperanton nelonge, tamen ili ĉiuj scipopis

konversacii Esperante. Funkciis ankaŭ studa kaj diskuta E-kurso gvidata de s-roj Hori Jasuo kaj Mizuno Yoshiaki spertoplenaj en



Gaja vespero de e-istoj de Kanto

E-istoj partoprenantaj en la Kunloĝado de Kanto antaŭ la E-Domo en Yatugatake



instruado. La kursanoj preparis artikolon antaŭ la aktivado kaj en la kurso ili faris studon kaj diskuton.

La vespera renkontiĝo estis enhavoriĉa kaj ĝojoplena. Talenta s-ro Hori Jasuo ludis ŝakuhaĉon kaj elmontris siajn fotojn faritajn en Francio. Liaj mirinda prezentado kaj humuraj paroloj vekis de tempo al tempo aplaudadon de la ĉeestantoj. Kaj ĉiuj kune kantis Esperantaj kantojn. La plej interesa estis diveno de famaj floroj de la mondo, mi 3-foje havigis al mi ŝancon kapti premion. Mi ege ŝatas la telefonan magnetan karton faritan memore al la 100-jariĝo de Esperanto. En la vespera renkontiĝo oni anoncis la aranĝojn por la 48-a E-Kongreso de Kanto kaj la 33-a E-Festo en Meguro, Tokio. Bedaŭrinde, tempo ne permesis al mi partopreni en tiuj aktivadoj.

VIZITO AL LA IAMA LERNEJO DE LUSIN

Post la 85-a Japana E-kongreso okazinta en Kanazawa s-roj Nagase Ikai kaj Aoki kondukis min al Fukui por viziti la antaŭan loĝejon kaj memorhalon de s-ro Fuĵino. S-ro Fuĵino naskiĝis kaj pasigis sian

lastan tempon en Fukui. En 1981, Fukui kaj Shaoxing, hejmloko de Lusin, fariĝis ĝemelaj urboj. En la memorhalo oni ekspoziciis grandan kvanton da fotoj kaj materialoj. Laboranto de la halo rakontis al mi multajn kortuŝajn aferojn en amika interkomunikiĝo inter la du urboj.

Post la Kunloĝado de Kanto mi forlasis Esperanto-Domon en Yutugatake kaj vojaĝis per ekspreso Shinkansen al Sendai, centra urbo en nordorienta Japanio. De 1904 ĝis 1906 Lusin lernis en la tiea medicina kolegio. La 19-an de oktobro, kiam mi atingis Sendai, ĝuste estis la 52-a datreveno de forpaso de Lusin. En la stacidomo de Sendai s-ro Gotou Humihiko min atendis kun la revuo EPC en la mano. Vidinte s-ron Gotou Humihiko, mi rememoris, ke li estis vigla en la 17-a Komuna Seminario de ĉinaj, japanaj kaj koreaj junuloj en



S-ro Numata Ryokiki kaj lia edzino rete legantaj EPC


Pekino pasintsomere. Ni venis en lian loĝejon, kaj li tuj ekokupis sin per aranĝo por la vespera renkontiĝo kun lokaj esperantistoj, post tio li funkciigis sian komputilon kaj prezentis al mi sian esploron de Esperanto.

En la sekvanta tago mi, s-ro Gotou kaj prof. Matumoto Takasi, prezidanto de Sendai E-Societo, kune venis en la universitaton Tohoku kaj vizitis la ŝtuparan klasĉambron, en kiu Lusin sekvis la anatomian kurson gvidatan de s-ro Fuĵino. La antaŭa medicina kolegio ja fariĝis antaŭlonge parto de la universitato Tohoku. Tie

staras monumento de la medicina kolegio kaj statuo de Lusin. En la universitata domo de historiaj materialoj kaj objektoj konserviĝas iuj objektoj kaj dokumentoj pri la restado de Lusin en la lernejo.

Posttagmeze ni vizitis la unuan loĝejon de Lusin en Sendai kaj la monumenton pri li ĉe la muzeo Sendai. La monumento konstruita en 1961 estis ĉirkaŭita de verdaj pinoj kaj sur la ŝtuparo antaŭ ĝi aromis freŝaj floroj, kiuj esprimis la karmemoron de Sendai-anoj pri Lusin kaj ilian sinceran amikecon al la ĉina popolo. ■

Prof. Matumoto Takasi (dekstre) kaj s-ro Gotou Humihiko (meze) ĉe la statuo de Lusin en la universitato Tohoku



Al geamikoj esperantistaj

de LU JIXIN (Ĉinio)

Sopiras jen vi

— Al s-ro Günther Becker en Germanio

Sopiras jen vi verd-kamparon,
Sur kiu helas esper-ondo,
Zefiro kisas foliaron,
Sur kiu trilas birda ton' do.


Sopiras jen vi verd-arbaron
Sed sen milita sanga fronto.
Arĝenta luno plukas harpon
Ĉe kio trilas birda rondo.

Verŝante ĉien la teneron
Vi vadas tra nebul' kaj ondo,
Dissemas verdan la esperon:
Printempu, pacu nia mondo!

Bela renkontiĝo dramas

— Al s-ro Tom Arbo Hæg en Norvegio

Eble prujno sur-vang-hara
Jam forlekis pimpan junon,
La rigard' ne plu disverŝas
Jam romancon kiel luno.



Lu Jixin instruas Esperantan kanton.

Eble longe vi kutimas
Mute stari en vespero
Per rigardo sperta kombi
Ĝoj-malĝojojn sur la tero.

Sed amikon akceptante,
Via koro ree flamas,
Brilas la junec' denove.
Bela renkontiĝo dramas.

Suno nokte kaj matene

— Akrostike al s-ino Anna Joonasen Svedio

la ĉielo Altas, luno ekrigardas.
Naĝas mi en dolĉa
gamo,
Nokta suno — nobla
amo.
ruĝa lumo Aldas, min
zorgeme vartas.

Kiel ruĝa Artas! kiam tago
startas,
Nubo flugas kun ak-
lamo.
Nova suno — viva fla-
mo.

Bona koro Ardas, mi do bone
fartas.

Vespera arieto

— Promeni kampe de s-ino Britta en Svedio

Kiom longas pado el ĝarde-
no?
Ni mezuru kune per promeno!

Pajloj disaromas en zefiro,
El spaliro glitas birda trilo.

Rampas jam obskur' sur kam-
po onda,
Pin' rimiĝas kun murmuro
fonta.

Okcidente laca suno sinkas,
Sed la lasta flam' sin sorĉe
svingas.

Oriente helas lun' — spegu-
lo,
Sur ĝi flosas jen nia figuro.

Oh, la svelta pado kiel kor-
do,
Mi leĝere plukas ĝin per kor'
do.

Britta, en vespero poezia
Ravas min jam spaco idilia.

Mi komercas per Esperanto

Antaŭe, kiam ni prezentis ĉinajn esperantistojn en tiu rubriko, ni senescepte tuŝis ilian studadon kaj uzadon de Esperanto. Ĉi-foje ni konigas alian ĉinan esperantiston Ĉielismo Von (Wang Tianyi) kiel sukcesan ekzemplon fari Esperanton profitiga. Laŭ nia peto li rakontis al ni sian Esperantan karieron. Eble lia historio donos al ni edifon.

La Red.

de ĈIELISMO VON

EN 1957 mi naskiĝis en la borista familio en la orienta antaŭurbo de Xi'an, Shaanxi-provinco. Mia patro estis ĉarpentisto. En 1974 mi finis lernadon en mezlernejo kaj eniris en fabrikon, kie mi laboris preskaŭ 20 jarojn. Dum tiu tempo mi edziĝis kaj ekhavis filinon. Ankaŭ mia edzino estas laboristino kaj nia filino vizitas mezlernejon. Nun mi estas respondeculo de la Esperanto-Asocioj de Shaanxi-provinco kaj Xi'an, estrarano de la Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo kaj delegito de SAT en Ĉinio. En mia juneco Esperanto donis al mi multajn belajn rememorojn.

KONTAKTIĜO KUN ESPERANTO

Vizaĝe al la historia turnopunkto de la reformado kaj por-domalfermo en Ĉinio en 1978, mi sentis kaj ĝojon kaj konfuzon. Mi estas idealisto kaj ĉiam plena de fido al la vivo. Mi amis literaturon kaj lingvojn, do mi memlernis dum laboro.

Iutage mia kuzino diris al mi, ke ŝian malgrandan librovendejon vizitis maljunulo, propagandanta Esperanton. Post nelonge la

maljunulo funkciigis Esperantan kurson apud la librovendejo. Multaj homoj aliĝis al la kurso, ankaŭ mi konsilis al du el miaj kolegoj lerni kune kun mi. Ni estis fervoraj por la lernado, sed rifuzitaj de la instruisto pro la limigiteco de la klasĉambro.

Ni insistis. Komence ni lernis starante ekster la ĉambro ĉe fenestroj. Poste iuj forlasis la lernadon, kaj ni povis lerni starante malantaŭe en la ĉambro. Post nelonge ni havis sidlokojn. Venis frosta vintro, restis nur dekelkaj kursanoj. Ankaŭ miaj kolegoj ĉesis lerni, sed mi ne.

Mi finlernis elementan lernolibron post unu monato. Mi ne havis Esperantan vortaron, mi do prunteprenis kaj mane kopiis ĝin. La instruisto laŭdis min. Li diris, ke oni povas bone lerni Esperanton, nur se oni prenas ĝin kiel karieron. Tiam mi ne tute komprenis liajn vortojn, ĉar mi estis ankoraŭ juna kaj Esperanto ne estis sola elekto por mi.

UNUA RENKONTIĜO KUN FREMDLANDA ESPERANTISTO

Ĉu Esperanto havas praktikan valoron? Por esperantistoj, kiuj vivas en fabriko aŭ vilaĝo, kiel mi, tio ĉiam estas reala problemo.

Komprenoble estas preskaŭ neeble, ke oni plibonigas la vivon nur per Esperanto. Tiam mi nur deziras interparoli kun alilandaj samideanoj en Esperanto. Kiam mi parolis kun Geoffrey Sutton, la unua fremdlanda samideano, kiun mi renkontis, mi kvazaŭ surdulo nenion komprenis, kvankam mi flue parolis. La kaŭzo estis, ke mi nur parkere lernis, sed ne praktikis la lingvon en la ĉiutaga vivo.

GVIDI ESPERANTAJN KURSOJN

Mi lernis Esperanton pli frue ol miaj samaĝuloj, sed nur en 1983 mi komencis senpage instrui Esperanton en teknika lernejo de la fabriko. Tiam estis nur iom pli ol 30 kursanoj. Mi prenis Esperanton kiel mian ĉefan karieron. Mi gvidis multajn kursojn kun preskaŭ 1 000 lernantoj.

ESPERANTO NE RESTU SURBUŜE

Mi tre atentis praktikadon de Esperanto en la socio, kiu profundigas amikecon, riĉigas sci-ojn kaj etendas propagandon de nia lingvo. En 1984 Esperanto konatigis min kun s-ro Nomura Tada-cuna de akvoproduktaĵa instituto en Kumamoto, Japanio. Kiam li vizitis Ĉinion en 1987, ni petis

lin rigardi fiŝejon por interŝanĝi spertojn pri fiŝbredado. En la sekvanta jaro mi skribis al li, ke li liveru avangardan teknikon tiurilate. Pro la abundeco de termofontoj ĉe montoj en Xi'an-regiono, oni enkondukis teknikon kulturi molŝelajn ĥeloniojn en varmeta akvo, kiu tiutempe estis avangarda kaj altiris la atenton de akvoproduktejoj en kaj ekster la provinco. Krom doni teknikajn informojn al konsultantaj entreprenoj, mi ankaŭ helpis la registaron de Chang'an-gubernio en Shaanxi-provinco investi konstruadon de eksperimentejo de molŝelaj ĥelonioj en la termofonto Beida

to de mia vivovojo. Post pli-oldek-jara praktikado de Esperanto mi konsciis, ke Esperanto restos utopio, se ĝi ne estos aplikata en tiu aŭ alia fako. Ĉu Esperanto havas praktikan valoron? Jes. Do mi senhezite ekŝiĝis por efektiviĝi ĝian praktikan valoron. Tiam mi ne havis monon, nur profundan amon al Esperanto. Mi bone konis la Esperantan movadon en kaj ekster Ĉinio. Mi ne memoris, kun kiom da esperantistoj en kaj eksterlandaj mi korespondis. Tre multajn leterojn mi ricevis ĉiujare! Mi uzis ŝparitan monon por korespondado. Mi kredis, ke mi povas bone

ĉe nacimalplimultanoj en Tibeto kaj Yunnan aŭ ĉe laboristoj kaj kamparanoj. Mi faris aliajn servojn por esperantistoj. La praktiko pruvis, ke mi povas tute vivteni min per Esperanto, kvankam mi vivas ne riĉe. Kompreneble oni ne povas fariĝi riĉega per iuj servoj por esperantistoj, kaj Esperanto-turismo nun ankoraŭ ne estas tiom prospera. Foje ŝanco puŝis min sur la vojon komerci per Esperanto.

MI KOMERCAS PER ESPERANTO

Delonge mi faris internaciajn komercojn per Esperanto, kaj kelkaj el ili estis sukcesaj, sed ne grandaj. Laŭ la nuna vidpunkto, ankaŭ komerco per Esperanto devas iri profesie. Se oni profesie komercas per Esperanto, apliko de Esperanto en la internacia komerco sukcesos kaj disvolviĝos, kaj Esperanto ludos gravan rolon en la internacia komerco. Ekzemple mi negocis kun bulgara esperantisto-komercisto. Aŭtune de 1998 mi ekŝiĝis, kiam mi forsendis la okan 40-futan konteneron. La negoco estis plenumita tute per Esperanto. Mi volus demandi tiujn, kiuj opinias Esperanton sentaŭga: Kion signifas ilia "taŭgeco"? Antaŭe iu demandis min, ĉu oni povas fari negocon per Esperanto? Mi kapjesis. Kaj kiom da monsumo estis por negoco? Kelkdek mil juanoj (fakte mi troigis la sumon). Li kuntiris la nazon. Kaj nun mi pensas, ke 2 milionoj da juanoj certe meritas ilian atenton.

En 1998, kiam la ĉina internacia komerco sin trovis ne en tiel bona stato, miaj kunlaborantoj pri internacia komerco en Tongchuan estis laŭditaj de siaj superuloj. Oni diris, ke ili devas danki min, sed mi pensis, ke ili devas danki Esperanton. Nun ni komercas per Esperanto ne sole por vivtenado, sed ankaŭ por disvolviĝo. ■



Ĉielismo Von en primora vilaĝo de Yunnan

norde de Qinling-montaro. S-ro Nomura Tadaĉuna tri fojojn venis al Xi'an por tiu esplorado. Dum lia vizito ni aranĝis aliajn fakajn interŝanĝojn, ekzemple kiel solvi la problemon de maskliĝo de tilapio (*Tilapia Mossambica*). Nun la eksperimentejo multe pli grandiĝis. Kiam ni denove vizitis ĝin, la veteranaj laborantoj ankoraŭ memoras tion, kion ni esperantistoj faris por ili.

TURNOPUNKTO EN LA VIVOVOJO

La jaro 1994 estis turnopunk-

vivi en Esperantujo.

PROVO EN ESPERANTA TURISMO

Xi'an, faman antikvan urbon de Ĉinio, ĉiujare vizitis multaj en kaj eksterlandaj esperantistoj. Mi aranĝis viziton de esperantistoj de Xi'an al aliaj lokoj por turismo aŭ Esperanto-kunveno. Foje mi aranĝis en Xi'an ĉinan simpozion pri Esperanto-turismo. Post 1994 mi vivtenis min per Esperanto-ĉiĉeronado. Mi akompanis eksterlandajn esperantistojn al diversaj lokoj de Ĉinio, inkl. gastigi ilin

Pli bona vivmaniero

Mi volus scii, kiel vivas kaj amuziĝas ĉinaj infanoj.

NOVIKOVA GALINA (Rusio)

de XIANG HONG

XINRAN saltadis jam 20 minutojn sur somiero kaj nevole foriris post fojarefoja urĝado de la patrino. La vintra suno estis ne tiom varma, sed ŝi jam ŝvitis tutkorpe kaj la patrino portis ĉiujn vestojn, kiujn ŝi demetis. La patrino helpis al ŝi ŝanĝi la veston malsekiĝintan, admonante al ŝi streĉi la atenton en la kurso. Malzorgeme kapjesante, Xinran unuspire eltrinkis duonskatolon da kokakolao. Poste ŝi eniris en la klasĉambron kun kontento.

Estis posttagmezo de sabato. Xinran vizitis duhoran kurson de kaligrafio en geknaba palaco. Ŝajnas, ke por la sesjara infano la saltado sur somiero estas multe pli altira ol kaligrafado. Ŝia patrino, staranta inter la gepatroj de la aliaj infanoj en la malantaŭo de la klasĉambro, vidis, ke la kapo de Xinran pli kaj pli malleviĝis eĉ ĝis la tablo kun peniko, tuĉo kaj papero. Kaj la instruisto estis montranta premittajn verkojn de siaj antaŭaj lernantoj, sed la patrino de Xinran zorgis, ĉu Xinran povas persisti en la kurso duhora ĉiusemajne por du monatoj.

Xinran kreskas tute same kiel aliaj samaĝuloj. Kiel solinfanoj ili ekĝuis apartan prizorgon, kiam ili estis ankoraŭ en la ventro de la patrino. Antaŭ la aĝo de 2-3 jaroj ili estas flegataj de la geavoj aŭ vartistino. En la aĝo de 3-5 jaroj ili vivas en infanĝardeno por ricevi klarecon kaj lerni, kiel vivi en kolektivo. La ĉinaj geknaboj plejparte ricevas unujaran propeĉitikon antaŭ ol eniri en ele-

mentan lernejon. Tamen pli kaj pli multaj gepatroj ne plu kontentiĝas pri edukado nur en infanĝardeno kaj lernejo. Semajnfine la infanoj vizitas, krom amuzejo, ankaŭ geknaban palacon aŭ lernas ĉe familia instruisto pri dancado, pentrado, komputorado kaj ludo de diversaj muzikiloj laŭ la volo de la gepatroj, kiuj pensas, ke en la 21-a jc. konkuro pli kaj pli intensiĝos, kaj volas, ke la infano penadu hodiaŭ por posedi pli da fakaj scioj kaj kapabloj kaj havi pli da ŝancoj. Kiam plejparto de la familioj tiel faras, oni timas, ke perdiĝos la estonteco de la infano, se oni ne faras la samon. Tamen la patrino de Xinran preferis, ke ŝi senzorge vivas, ol ke ŝi pene lernas ian specialan kapablon. Pro tio, tuj kiam ŝi lernis en la unua klaso, la patrino partoprenigis ŝin en la kurso de kaligrafio, esperante, ke ŝi kon-

servos ion tradician en la komputora epoko. Vidinte ŝian senvinglecon en la kurso, la patrino timis, ke ŝia deziro malfacile realiĝos.

Poste, ŝajnis, ke Xinran trovis plezuron en la kurso de pentrado. Ŝi estis ĉiam ĝoja viziti la kurson kaj eĉ petis, ke oni konduku ŝin por pentri en la naturo.

Kian vivon bezonas la infanoj? "Ni ne volas la ĉielon malpurigitan de sciencaj ludoj, nek fariĝi komputoraj infanoj pro viaj inventoj", tio estas la kantoteksto, kiu multe plaĉis al la patrino de Xinran. Ŝi kaj ŝia edzo neniam devigis sian filinon lerni tion aŭ alion. Kvankam kulture multflankajn talentojn estas bona afero, tamen se tio deŝiras la ĝojon de la filino en ludado, ili preferas forlasi tion. Ankaŭ la ĉina eduka departemento alprenis rimedojn en la lastaj jaroj por malpezigi la ŝarĝon de la lern-

(Daŭrigo sur p. 28)



Danco-lernado riĉigis la vivon de la infanoj.

Maljunuloj de Ĉinio

Fotoj de WANG ENPU

Enketo montras, ke averaĝa vivdaŭro de la ĉinoj pli kaj pli longiĝas. Stabileco de la vivo estas unu el la faktoroj longigantaj vivdaŭron. Nun Ĉinio havas 120 milionojn da pli-ol-60-jaraj maljunuloj. La maljuniĝo de la socio estas multe atentata de la instancoj.

Granda parto de la ĉinaj maljunuloj estas prizorgataj de siaj gefiloj. Lastajn jarojn oni establis multajn maljunulejojn kaj maljunulajn apartamentojn. Ilia vivtenado estas pagata de ili mem, iliaj posteuloj kaj la socia asekuro.

Registaraj instancoj kaj entreprenoj establis



La maljunaj geedzoj vizitas legombazonon.

En legoĉambro por maljunuloj






Lerno de ludarto

amuzejojn por emeritoj, kie maljunuloj povas laŭ siaj gustoj fari pentraĵojn, kaligrafiaĵojn kaj metiartaĵojn, ludi ŝakon, tablotenison, bilardon ktp. La ĉinaj maljunuloj ne bezonas zorgi pri sia vivtenado, sed multkolorigi sian maljunecon.

Kaligrafado




Matene multaj maljunuloj dancas kaj gimnastas sur placo ĉe strato.





Pentrado sur ovoŝelo



Ludo de bilardo

Pekina opero multe plaĉas al maljunuloj.



Proksimiĝi al Meili-neĝmonto

En junio 1995 iu turisto el Singapuro vizitis Diqing-altebenaĵon en Yunnan-provinco, sudokcidenta Ĉinio. Li estis fascinita de la bela pejzaĝo: blanka neĝmonto, senlima herbejo, maro de floroj, pompaj kaj misteraj temploj, pitoreska valo, originalaj moroj de tibet-nacianoj. Ĉio ĉi rememorigas pri Shangrila, kiun en multaj jaroj oni serĉadis. Ĉiuj interesatoj pri Shangrila nun fiksas sian rigardon sur Diqing.

En la tibeta lingvo Shangrila signifas "sanktejon". En 1933 brita romanisto James Hilton menciis "Shangrila" en sia romano "La perdita horizonto" pri efektivaj okazaĵoj. Lia libro rakontas, ke tri amikoj de diplomato veturis per aviadilo, kiu pro akcidento devigite surteriĝis en mistera valo ĉirkaŭita de neĝmontoj. Helpe de lokanoj ili rekuniĝis kun siaj familianoj. Sed poste ili neniel povis trovi la lokon kaj memoris nur ke la lokanoj nomis ĝin Shangrila. La libro tiel priskribas ĝin — blua plataĵa lago, belaj temploj, viglaj urbetoj, harmoniaj popoloj, kunfanditaj religioj kaj diversaj kulturoj. Jen loko fora de profitemo kaj trompo, lando de kvieto kaj paco.

En la Dua Mondmilito usona aviadilo falis en Diqing, la pilotoj estis savitaj de lokanoj kaj kuracitaj en templo. Ili restis en Diqing pli ol unu semajnon kaj estis fascinataj de la religia etoso, bela pejzaĝo kaj kvieta vivo. Ŝajne ili retrovis la "perditan horizonton".

De ĉi tiu numero, kune kun la legantoj ni eniros Diqing-altebenaĵon por viziti la neĝmontojn, valojn kaj templojn, sperti la naciajn morojn, sanktecon kaj misteron kaj serĉi la sopiratan Shangrila.

La Red.

Teksto kaj fotoj de CHENG WEIDONG

ĈE la limo de Yunnan kaj Tibeto majestas Meili-neĝmonto, kiu estas la ĉefa el la 8 diaj montoj en la tibet-nacia regiono. Ĝi estas la unua celloko de nia karavano por serĉi Shangrila.

MISTERA NEĜMONTO

Meili-neĝmonto nomiĝas ankaŭ Monto Princo. Ĝi altas super la marnivelo je 6 740 metroj. Ĝia ĉefa pinto Kagebo estas ankoraŭ ne surgrimpita de homoj. Najbare de ĝi staras alia neĝmonto Miancimu, kiun la lokanoj rigardas kiel edzinon de Kagebo. Ĉiujare venas tien amasoj da homoj, inter kiuj multas religiuloj de la tibeta budhismo.

Tamen, ŝajne Meili-neĝmonto estas ĉiam kaŝita de nebulo, nur malmultaj vidis ŝian vizaĝon. Iu loka

tibet-naciano diris, ke en 1989 Banĉen Erdini la 10-a venis tien. Je la komenco la neĝmonto kaŝiĝis en nebulo kaj nuboj, sed kiam Banĉen-lamao komencis preĝi, forflugis la nebulo kaj nuboj kaj Kagebo montris sian aspekton. Dekkelkajn minutojn poste, ĝi refoje kaŝiĝis.

Ju pli ĝi aspektas mistera, des pli oni deziras koni ĝin. En 1991 la Komuna Montgrimpa Teamo de Ĉinio kaj Japanio kun 17 membroj intencis surgrimpigi Meili-neĝmonton. Granda lavango atakis ilin. Ili-aj revoj kaj korpoj restas ĉiam sur Meili-neĝmonto, kaj ĉi tiu en la koro de homoj estas iom emocia.

VILAĜO ĈE LA NEĜMONTO

Sub Kagebo estas senlima glacikampo, kiu estas tre rara nuntempa glacikampo en loko ne alta super la marnivelo, en ne alta latitudo kaj kun iom alta

temperaturo. Ĝia "neĝlango" etendiĝas ĝis loko je 2 000 m super la marnivelo. Laŭ mito, Kagebo estis loka dio de Deqin-gubernio en Diqing, poste ĝi sin turnis al tibeta reĝo Gesar kaj iĝis protekta dio de la regiono.


Meili-neĝmonto apartenas al Deqin-gubernio. Por proksimiĝi al la monto, ni ekveturis al Deqin de Zhongdian, ĉefurbo de Diqing. La distanco de 180 km postulis 5 horojn da aŭtoveturo — estis zigzaga montvojo kaj neĝmonta pasejo je 4 000 m super la marnivelo. Ni gaje babilis, ĝuante belajn pejzaĝojn kaj freŝan aeron, kaj neniu el ni sentis lacon.

Nia aŭto forlasis la gubernian urbon Deqin kaj ni jam vidis la neĝmonton, sed la distanco estis sufiĉe longa. Ĉina proverbo diras: "Monto videbla estas ŝajne proksima, sed post kurado al ĝi ĉevalo mortas pro lacego." Ni veturis per aŭto, sed ne per ĉevalo, tamen iom ekster la gubernia urbo ne plu estis aŭtovojo, do la aŭto fariĝis senutila.

Ni ĉiuj devis piediri. Apude fluas Lancang-rivero, tre fama en suda Ĉinio. Tondras la kota fluo kun ŝtonoj kaj arbobranĉoj. Ni spiregante grimpis laŭ la montvojeto ĉe la rivero. La tagmeza suno kruelis por montri al ni, kio estas transviolaj radioj sur la altebenaĵo. Kvar horojn poste, ĉe la sunsubiro ni venis al la vilaĝo Yongming piede de Meili-neĝmonto.

Ĉiuj vilaĝanoj estas tibet-nacianoj. Ili loĝas en lignaj domoj. Ni ekscitiĝis pro la klara kaj malvarma akvo el la neĝmonto kaj multe trinkis. Post iom da ripozo ni promenis en la vilaĝo kaj vidis fruktarbojn. Estis aŭtuno, sezono de rikolto, la afablaj kaj gastamaj tibet-nacianoj ĉirkaŭis nin, donacis al ni ĵus rikoltitajn pomojn, granatojn...

Glacirivero



La aŭtoro en Meili-neĝmonto

Nokte, la vilaĝanoj prezentis al ni naciajn dancojn kaj kantojn ĉe la tendarfajro. En belaj tibetaj roboj ili bonvenigis nin. Ili gaje ludis kiel en festaj tagoj ĝis la noktomezo.

Ni dormis en hejmoj de la vilaĝanoj. Mi kuŝis sub varma litkovrilo, flarante la aromon de pomoj apud la lito, rigardante la lunon kaj stelojn tra la fenestro. Mi unuafoje spertis tian pastoralan vivon.


MI VIDIS LA DIAN MONTON

En la sekva mateno ni ekiris kun steloj.

Ni marŝis en primitiva arbaro. Ju pli alten ni grimpis, des pli mallarĝiĝis la vojo. Mi prenis branĉon kiel apogilon. Je la 10-a horo matene, ni atingis la templon Princo ĉe la piedo de Kagebo. Kvankam malgranda, ĝi estas nepre vizitata de la piaj religuloj, pilgrimantaj al la dia monto.

Post ripozeto en la templo, ni ekiris al la glaciokampo. En bruego de lavango kaj glacisplitiĝo, ni singardeme surgrimpis la glaciokampon, kun multaj truoj, fendoj kaj sulkoj, iuj eĉ tre profundaj. Por plua grimpadado necesis taŭgaj iloj.

Por garantii nian sekurecon, la lokanoj admonis nin ĉesigi la grimpadon. Kun bedaŭro ni retiriĝis. Tamen ni estis tre kontentaj. Ni ne surgrimpis la neĝmonton, sed Kagebo kaj Miancimu montris sian imponecon — tiam foriris nebulo kaj nuboj. En la okuloj de la lokanoj ni estis la plej feliĉaj. ■



Meili-neĝmonto

Tibet-nacianoj

Maljunulo kultanta Dion de Monto





Pilgrimantoj

Tibet-naciaj virinoj preĝantaj



Pentraĵo — esprimo de amo en la koro

de PANG NAIYING

SINJORO Zhang Pu instruas pentradon en la pekina infanĝardeno Lantian (blua ĉielo). La infanoj vokas lin ne “instruisto”, sed “avo”. La intima voko tiel ĝojigis kaj tiklis lian koron, ke li fariĝis duoble pli tolerema kaj afabla. Do lia toleremo ofte kaŭzis petolaĵojn de la infanoj: kiam li estis telefonanta, petolaj knaboj aŭ metis en mineralan akvon diverskolorajn farbojn, por ke la akvo fariĝu “suko” de oranĝo, kokoso aŭ kratago, aŭ pentraĉis sur pordo, fenestro, planko kaj pura muro. Tiam anstataŭ koleri li nur ridetis, kaj atentigis la vartistinojn, ke ankaŭ ili ne koleru. Li opinias, ke ĉiuj infanoj estas petolaj, kaj ilia naturdotita talento ofte naskiĝas dum ilia petolado.

Li tre amas tiujn infanojn. Parolante pri la “sukofarinto”, li diris, ke li ekŝatis tiun jam je la unua vido, ĉar la knabo petis lin seriozmiene: “Avo Zhang, memoru min, mia nomo estas Wang Yichen.” La knabo povas bone esprimi sin kaj havas belan voĉon. Li plej ŝatas pentradon kaj ĉiam pentras kun pasio.

Sed la same petola Malgranda Drako estis “malakceptita” de la avo. Li diris, ke li akceptos nur unu el la du ĝemeloj. Granda Drako naskiĝis je unu minuto pli frue ol la frato. La “pliaĝa frato” tre amisian frateton. Ambaŭ estis fervo-

raj helpi la instruiston, sed ili ofte fariĝis “terurknaboj”, kiam ili “alianciĝis”. Jen pro tio la avo akceptis nur unu el la fratoj. Do Malgranda Drako ofte venis enrigardi en la pentroĉambron kun envio: “Avo Zhang, mi volas rigardi, kiel iras la pentrado de mia frato.” Fakte li tre ŝatis pentri. S-ro Zhang ridis, ĉar li “malakceptis” Malgrandan Drakon ĝuste por altiri lin al pentrado. Malgranda Drako eniris en la pentroĉambron, jen ĝustigis la pentroplaton de la frato, jen helpis lin en farbouzado, kaj fine li mem ensorbiĝis en pentradon. Same kiel la pliaĝa frato, Malgranda Drako tre ŝatis bestetojn. Lia pentraĵo “Elefantoj” impresis per forta tridimensia dispozicio kaj infana imago. Ankaŭ Granda Drako estis talenta en pentrado. Li pentris “Semi sunojn” inspirite de infana kanto: “Mi havas belan deziron, ke mi povos semi sunojn post plenkresko. Unu semo jam sufiĉas, ĉar multajn fruktojn ĝi donos. Unu el ili mi donacos al Antarkto, la duan al Arkto, la trian ni uzos en vintro, kaj la kvaran en nokto, tiel ke ĉie kaj ĉiam en la mondo estos varme kaj hele...” La infanoj tre ŝatis la kanton, kaj precipe Granda Drako. Li diris, ke sunlumo estas sepkolora, tial la suno sur lia papero estis sepkolora.

Knabineto Lin Mi ne estas parolema, sed kiam ŝi ekprenis plumon, ŝi ĉiam penis rakonti sian

intencion al vartistino kaj kamaradoj. Aprile de 1998 El Popola Ĉinio okazigis la Unuan Internacian Konkurson “Verd-stela Pokalo” pri Infanaj Pentraĵoj kaj Fotografaĵoj kaj ŝia pentraĵo “Unuiĝu ĉirkaŭ la verda stelo” akiris oran premion. Antaŭ pentrado s-ro Zhang diris al la infanoj, ke verda stelo estas simbolo de Esperanto kaj de vivo. Esperantistoj amas pacon kaj deziras amikiĝi al ĉiuj popoloj de la mondo por kune progresi. Kaj la knabineto pentris grupon da blankaj kolomboj kaj verdajn stelojn ĉirkaŭantajn grandan verdan birdon. La birdo flugas kun olivbranĉo en la beko kaj knaboj sur la dorso. Ŝi diris al la avo, ke oni povas rigardi la grandan birdon kolombo de la paco aŭ Ĉinio, ĉar la teritorio de Ĉinio similas al birdo. Ĉe tio s-ro Zhang rememoris, ke antaŭe ŝi pentris “Tri kokojn” kaj li demandis ŝin, kial ŝi pentris tion. Ŝi respondis, ke ŝi ŝatas tion kaj ŝi naskiĝis en kokojaro. Nun Lin Mi havas pli vastan spacon por sia imagipovo. S-ro Zhang demandis ŝin: “Kien flugas la verda birdo?” Post momenta pripenso ŝi pentris sunon supre dekstre sur la papero: “Ĝi flugas al la suno por vojaĝi en la kosmo.” “Ĉu ĝi portas nur ĉinajn infanojn?” “Kune flugu la tutmondaj infanoj!” Ĉe tio aperis sur la birdo geknaboj en diversaj haŭtkoloroj. Kaj ŝi diris, ke la flavhaŭta

knabineto estas ŝi.

La infanoj havas mirindan imagipovon, sed s-ro Zhang volas, ke ili pensu pli profunde, opiniante, ke iniciatemo estos utila al ili en multaj flankoj en la estonteco. S-ro Zhang diris, ke Lin Mi estas facile inspirebla, kio dependis de ŝia lernado de pianludo, danco kaj kanto. Ŝia patrino, kuracisto, faris antaŭnaskan edukadon ofte aŭskultante muzikon, vizitante galerion de pentraĵoj. Krome ŝi vizitis kurson de infana psikologio. Ŝi ricevis filinon kvietan sed viglan je aŭdo de muziko. Kiam la infano estis dujara, ŝi subite diris al la patrino: "Ĉu mi por vi?" Ŝi pentris malgrandan homon, asertante, ke tio estas modelino. La patrino bone konservas la pentraĵon. Ŝi diris, ke ŝi ne devigas la filinon fariĝi pentristino, sed ŝi volas, ke la filino estos bone klerigita en ĉiuj flankoj kaj havos bonajn kvalitojn. Estas kruele tro frue puŝi la infanon sur profesian vojon. Ŝi diris ankaŭ, ke en ferioj ŝi sendos la filineton al kurso de uŝo-o, ĉar ŝi estas tre malforta.

Infanoj, kiuj aspiras al kreado, estas absorbiĝemaj en pentrado. Sed kiam ili ne trovas objektojn por pentri, ili ofte montras malpaciencon. Ekzemple knabo Wang Fan, kiu multe pentras, foje demandis: "Avo Zhang, kion mi pentru plu?" S-ro Zhang do diris al la infanoj, ke oni pentru ne sole laŭ imago, sed ankaŭ laŭ observado de la konataj realaĵoj. Ĉiun lundon li postulas, ke la infanoj rakontu, kion ili vidis en la lastaj sabato kaj dimanĉo. La infanoj konkure rakontis kaj estis multe inspiritaj de tio. Knabo Cui Haofu diris, ke li televidis reklamon pri minaco de poluo de maro al la fiŝoj, li do pentris "Ĉe mi ne estas poluo". Por pruvi, ke lia akvo estas pura, li pentris multajn fiŝojn kaj balenon kun kelkaj idoj en la ventro. Li diris, ke ankaŭ homoj, same kiel la fiŝoj, ne havos idojn, se ili vivos en poluita medio.




Instruisto kaj liaj lernantoj

Temo pri poluado inspiris Wang Fan. Li diris, ke li tre abomenas fumadon de la patro, ke li kaj lia patrino ofte petas la patron eldomiĝi, kiam li estas fumanta. S-ro Zhang demandis: "Ĉu fumo ekstere ne poluas la medion?" Post momenta silento Wang Fan diris: "Fumado poluas la medion de ni ĉiuj." Li do pentris "Ne fumu plu", en kiu estas fumanta pipo, nigraj lipoj kaj gorĝo, ruĝaj manoj fariĝantaj grizaj, kaj supre estas fumanta plezurŝipo, kies fumo nigrigis la marakvon de Beidaihe, fama strando por somerumado. Apud la pipo estas granda boto, pri kiu Wang Fan diris, ke li volas surtreti cigaredojn de ĉiuj homoj. Multaj el la infanoj vizitis Beidaihe, kaj ili ĉiuj volas pentri pri ĝi. Kaj s-ro Zhang diris: "Vi povas pentri ĝin, sed pri malsamaj pejzaĝoj." Knabo Zhou Weihao pentris "Nian mondon": prosperaj arboj ombras vilaojn, multaj birdoj dancas kune kun infanoj. Li diris, ke estas birdoj, se estas arbaro. Ye Yan pentris marbordan pejzaĝon de Beidaihe: supre estas vigla trafiko kaj altaj domoj, sube estas blua maro, marfundo ornamita per ĉielarko, diversaj bestoj kaj vegetaloj en akvo... Li diris, ke sur la tero estas tro brue, ke nur sur marfundo estas kviete. Li diris ankaŭ, ke li konstruos infanan domon sur la marfundo,

por ke la kamaradoj povu rigardi la belan marfundan pejzaĝon en kristale travidebla domo de la maro.


Pasio de kreado originas de amo. S-ro Zhang esperas, ke ĉiuj infanoj estos amoplenaj. Li opiniis, ke la solinfanoj estas superŝutitaj de amo, sed mankas al ili amo al la mondo kaj al la medio de la homaro. Oni devas fari al ili mediologian edukadon ĉe ilia infaneco, ke ili atentu bagatelaĵojn tuj ĉe si. Jen kial li ofte atentigis al la infanoj, ke ili ŝparu paperon kaj farbojn, ĉar paperfarado konsumas lignon kaj produkto de farboj poluas la medion. Li atentigis ankaŭ, ke la infanoj bone zorgu la veston dum pentrado, ĉar vestolavado bezonas akvon, dume al la tero jam minacas manko de akvo. Kaj la infanoj ĉiuj portis bluzon dum pentrado.

Bone efikis lia edukado. La infanoj montris sian amon al la naturo ne nur sur papero, sed ankaŭ en ago. En iu jaŭdo la du Drakoj estis irantaj al zoo kune kun la patrino. Survoje Malgranda Drako subite rememoris, ke tiutage li estas deĵoranto, kaj petegis la patron porti lin al la infanĝardeno. Foje en buso kvietema knabineto Lin Mi akre kritikis iun plenkreskulon, kiu ĵetis ion eksteren tra la fenestro. Tiu hontiĝis kaj tuj petis pardonon. ■



Elefantoj

de ZHAO YOU (5-jara)



Ne fumu plu!

de WANG FAN (5-jara)

Unuiĝu ĉirkaŭ la verda stelo

de LIN MI (5-jara)





Semi sunojn

de ZHAO ZUO (5-jara)



Ĉe mi ne estas poluo.
de CUI HAOFU (5-jara)

Kie la mono plej valoras?

de XIE WEN

EN Ĉinio la ekonomiaj kondiĉoj en diversaj lokoj estas malsamaj, tial diferencas la prezo de varo. Enketo pri konsumado en 9 urboj diras, ke por aĉeti ion saman, oni elspezas 100 juanojn en Ŝanhajo, 84.1 juanojn en Pekino kaj 119.5 juanojn en Kantono.

Laŭ statistiko, en Kantono, ĉemara suda urbo, la prezo estas la plej alta, kaj evidente la valoro de mono estas malpli granda ol tiu en la aliaj urboj. Por sama vivbezono en Kantono oni konsumas 100 juanojn, en Ŝanhajo 84 juanojn kaj en Harbin nur 64 juanojn. La prezo en Ŝanhajo estas iom malpli alta ol tiu en Kantono.

La prezo en Pekino, Xi'an kaj aliaj 3 urboj estas mezgranda. Konsumi 70-75 juanojn en tiuj urboj sig-

nifas konsumi 100 juanojn en Kantono, konsumi 84-90 juanojn en tiuj urboj signifas konsumi 100 juanojn en Ŝanhajo. La prezo en Shenyang kaj Harbin estas la plej malalta kaj la valoro de ilia mono estas pli granda. Konsumi 100 juanojn en Shenyang signifas konsumi 148 juanojn en Kantono kaj 124 juanojn en Ŝanhajo; Konsumi 100 juanojn en Harbin signifas konsumi 157 juanojn en Kantono kaj 131 juanojn en Ŝanhajo.

Malsamaj urboj havas malsamajn prezojn, tial la efektiva enspezo de urbaj loĝantoj ne estas egalvalora kiel ilia nominala enspezo. La prezo en Pekino estas relative malalta, tial la efektiva enspezo de ĝiaj loĝantoj estas la plej alta en la 9 urboj. Tamen la prezo en Kantono estas la plej alta, tial la enspezoj en Ŝanhajo kaj Kantono diferencas per 10%, sed ne per 20% kiel oni opinias. ■

Abonu "Komencanto"

"Komencanto" estas gazeto por komencantaj esperantistoj de ajna aĝo kaj komencantaj aŭtoroj kaj agrabla legaĵo por ĉiu esperantisto. En ĝi aperas informoj pri historio de Esperanto, ĉefaj esperantistaj organizaĵoj, apliko de nia lingvo kaj diversaj interesaj E-periodaĵoj. Estas bonvenaj tradukoj, enigmoj, aforismoj, anekdotoj, desegnaĵoj, originalaj rakontoj kaj poemoj. "Komencanto" restas loko de renkontiĝoj por ĉiuj, kiuj volas amikojn, tial estas bonvenaj ankaŭ anoncoj kaj proponoj pri ajnaj temoj.

"Komencanto" aperas 8-foje jare. Eldonkvanto 500 ekz.

Redaktas kaj eldonas Viktor Kudrjavcev, 620041, Ekaterinburg, ab. k. 132, Ruslando
Abonkoto: Orienta Eŭropo 10 USD. Internacie 12 USD al UEA-konto vkud-a aŭ petu apartajn informojn ĉe la redakcio.

(Daŭrigo de p. 16)

antoj de elementaj kaj mezgradaj lernejoj. Krom akompani la filinon sin distri en geknaba palaco kaj amuzejo, dum feriaj tagoj ili ankaŭ ofte faras montogrimpadon en antaŭurbo. Vidante, ke la filino laŭplaĉe pentras sur la desegnotabulo, interparolante kun fazanoj kaj leporoj, kiujn ŝi imagis, la gepatroj pensis, ke la ĝojo de ses-jara infano devas esti tia.

Nun la ĉina registaro donas

pli grandan atenton al la kreskado de la infanoj, la lokaj registaroj starigis komisionon pri laboro por virinoj kaj infanoj kaj la "Leĝo por protekti neplenaĝulojn" publikigita en 1991 defendas la rajtojn de la infanoj pri vivo, sano kaj disvolviĝo. Krome, la ĉina socio jam ellernis trakti per matura animstato tiun generacion de solinfanoj. Antaŭ dekelkaj jaroj la solinfanoj rigardataj kiel malgrandaj reĝoj estis tro dorlo-

tataj. Vidante, ke la elspezo de la infano konsistigas 1/3 de la totala enspezo de la familio, oni ekpensis, ke por la infanoj eble ne sufiĉas nur la posedo de materialoj kaj kapabloj, sed pli gravas la lernado de pli racia kaj sana vivmaniero. Sociologoj montris, ke oni devas havigi al la infanoj modernan konscion de egaleco, toleremo kaj kreado kaj komprenigi al ili, ke la homaro kaj la naturo devas kunekzisti. ■



Kiel aminda ĝi estas!



Ĝi ricevis manĝaĵon en vilaĝo.

Hejmloko de grandaj pandoj

Teksto kaj fotoj de GUO SHI

Grandaj pandoj estas raraj mamuloj, kiuj vivas en arbaroj de ĉinaj provincoj Sichuan, Shaanxi kaj Gansu. Nun troviĝas nur 1 000 sovaĝaj grandaj pandoj. Por eviti pereon de tiuj "vivaj fosilioj" oni ne nur protektas la arbarojn, sed ankaŭ es-

ploras regulojn de ilia reproduk-tiĝo.

En la 80-aj jaroj, pro tio, ke periode velkadis bambuoj de Wolong-Naturparko de Grandaj Pandoj en Fengtong-vilaĝo, Sichuan-provinco, malsataj grandaj pandoj iris en vilaĝojn por serĉi manĝaĵojn. Tiaokaze vilaĝanoj ĝoje manĝigis ilin kaj portis la

malsanajn al la Ĉina Esplora Centro por Protekto de Grandaj Pandoj. La loĝantoj pace vivas kun la grandaj pandoj.

En la centro nun vivas 26 grandaj pandoj, naskitaj ĉefe en ĝardenoj. Sciencistoj faras ĉion eblan por akomodi ilin al sovaĝa vivmedio por ke ili kiel eble plej baldaŭ revenu en la naturon.



La Esplora Centro por Protekti Grandajn Pandojn en profunda montaro



Vizito





Patrino kaj ŝia ido



Artefarita fekundigo

Ĝi grandiĝis.



Reveno al la naturo





Vejĉi-ludo per interreto
Foto de XIE JUN

Zhongguancun — elektrona strato

Teksto de LI XIA
Fotoj de HUO JIANYING

Antaŭ la 80-aj jaroj Zhongguancun estis ordinara strato en nordokcidento de Pekino. Ĉar la loko estas proksime al la Pekina Universitato kaj Qinghua-universitato, sciencistoj kaj teknikistoj ĝin frekventas kaj establiĝis aroj da altteknikaj kompanioj. Dank' al tio Zhongguancun ekhavis rudimentan formon de elektrona strato. Poste komputilaj vendejoj aperis unu post alia ambaŭflanke de la strato


kaj la loko fariĝis vera elektrona strato.

En la 90-aj jaroj iuj mondfamaj komunikaj kompanioj, kiaj INTEL, MICROSOFT, IBM, COMPAQ kaj CHP, establis siajn filion, agentejon kaj trejnejon tie. Tio forte antaŭenpuŝis ĉinan komputilan industrion, kiu maturiĝis iom kaj iom kaj ekhavis siajn proprajn produktaĵojn kun famaj markoj, kiaj LEGEND, FOUNDER, GREAT WALL kaj STONE. Zhongguancun fariĝis la plej granda merkato de ĉinaj kaj alilandaj elektronaj produktaĵoj.

Konsultantoj



Ĉina komputila kompanio en Zhongguancun






Reklamoj pri komputiloj sur la fasado de konstruaĵoj ĉe la strato
Ili atendas takson por transporti hejmen ĵus aĉetitan komputilon.





En komputilo-kurso por komencantoj



La strato Zhongguancun



Porteblaj telefono kaj komputilo multe faciligas komercadon.

Foto de ZHOU YOUMA


Urbo de legemuloj

de PANG NAIYING

MEISHAN estas malgranda urbo ne impona, sed spiranta antikvecon kaj klarecon. Tie estas dense vicigitaj butikoj kaj malnovaj domoj, el kiuj multaj estas familiaj librobutikoj. Vizitantoj senescepte sentas densan etoson de legemo.

Fakte de antikveco tiu urbeto en la sudo de Sichuan-baseno estis paradizo de intelektuloj. La saĝaj prapatroj de la lokanoj ŝatis ne nur legi, sed ankaŭ konservi librojn. En la 8-a jarcento intelektulo Sun Changru, kiu posedis grandan kolekton da libroj, konstruis domon speciale por teni sian kolekton kaj instalas instruiston por doni lecionojn. Oni diris, ke ĝi estis la plej granda privata biblioteko siatempe en Ĉinio. Dank' al la aparta akcento de studo, aperis en la loko pli kaj pli multaj eruditaj familioj. En centoj da jaroj de la feŭdismaj dinastioj, kiam la kortegoj praktikis la ekzamenan oficistiĝan politikon, pli ol 880 homoj de la loko sukcese trapasis la kortegan vid-al-vidan ekzamenon de imperiestroj kaj fariĝis ŝtatoficistoj. Ege fama literaturista trio el la sama familio, nome Su Xun (patro), Su Shi (filo) kaj Su Zhe (filo), kreskis en tia kultura medio. Dank' al tio la loko estis honorita kiel "miljara urbo de poezio kaj literaturo".

La lokanoj de Meishan fieras pro tio. Malgraŭ sturmo de la tajdo de la merkata ekonomio, la intelektuloj de Meishan ankoraŭ konservis la karakteron de antikvaj kleruloj, kiuj restis apatiaj al vanta famo kaj profito, kaj sin tenis for de utilismo. Tion eksplikis versparo en la sidejo de la Leganto-Societo Unu Animo: "Post rigardo de ĉiuj pejzaĝoj en la mondo oni sentas legadon plej plezura; post gustumo de ĉiuj frandaĵoj de la homaro oni rigardas ankoraŭ legom-ojn plej bongustaj." La fondinto de la societo estas junulo Wang Hualin, kiu de infaneco ŝatas legi. Foje li ŝtele aĉetis libron kontraŭ la arakidoj, kiujn lia patrino rezervis kiel semojn. Kaj printempe lia patrino devis kulturati alian specon. Librelegado donis al li multe da scioj kaj li ĉiam estas elstara lernanto kaj en elementa lernejo kaj en la pli supraj. Post diplomiĝo li fariĝis instruisto kaj poste lernejestro. Tiam lia enspezo jam sufiĉis por lia bezono en libroaĉetado. Sed li trovis, ke pro leviĝo de prezo de libroj, iuj



En la Leganto-Societo Unu Animo

homoj, kiuj enspezis malmulte, ne povis laŭbezone havigi al si librojn, dum aliaj homoj, kiuj enspezis multe, perdis ŝaton de legado, sed ensorbiĝis en hazardludo. Wang Hualin pensis, ke oni devas pli multe akcenti kulturen klarecon por nobligi la spiriton, kaj la tradicio de legemo de la urbo ne devas esti ŝanĝita. Li ekŝiĝis kaj fondis leganto-societon per la tuta mono de la ŝparkaso, por ke oni povu legi laŭeble plej multajn librojn kontraŭ malgranda pago.

Ĉe la komenco la malgranda legoĉambro de la societo estis malofte vizitata, ĉar la libroj estis malmultaj. Fakte en tiu urbo preskaŭ ĉiu erudita familio posedas pli ol mil librojn, do kompreneble la centoj da libroj de la societo ne povis altiri al si legantojn.

Li do prunteprenis monon kaj aĉetis milojn da libroj. Krome li kaptis ĉiajn ŝancojn por diskonigi sian societon. Sur lia biciklo estis tabulo kun teksto "Leganto-societo Unu Animo pruntedonas librojn je malgranda pago". Li vaste disdonadis flugfoliojn, sur kiuj estas anonco: "Kiu pagos 30 juanojn, tiu povos pruntepreni librojn en unu jaro; kiu antaŭpagos 48 juanojn por mendi ĉe mi novajn librojn, tiu povos senpage pruntepreni librojn en unu jaro..." Por ŝpari monon, li ĉiam prenis plej malluksan hotelon kaj plej malmultekostan manĝon, kiam li iris al aliaj lokoj por aĉeti librojn. Anstataŭ dungi portiston, li ĉiam mem portis la pezajn sakojn plenajn de libroj al la fervoja kaj aŭtobusa stacioj. Li ankaŭ peris libroaĉetadon kontraŭ pago, por aĉeti pli da libroj per

(Daŭrigo sur p. 47)

Kiam Oriento renkontas Okcidenton...

Ren Ying estas vicĉefredaktorino de ĉina revuo eldonata en multaj lingvoj. Ŝi laboras por interkomunikado de Oriento kaj Okcidento, tamen antaŭ kelkaj jaroj, kiam ŝi ekstudis en Usono, ŝi multe suferis de kultura ŝoko. Leginte ŝian artikolon, mi ekpensis pri nia revuo "El Popola Ĉinio", pri nia lingvo Esperanto. Fakte EPC ne nur konigas Ĉinion, sed ankaŭ kunligas la mondon. Ĉiu esperantisto estas ankaŭ ponto inter diversaj kulturoj. Kiam Oriento renkontas Okcidenton, ili certe komprenos unu la alian.

Yu Tao

de REN YING

EN aŭgusto 1994 mi iris al Usono por studi en la komunika fakultato de Universitato de Ilinojso. En Usono mi ofte pensis, kial Dio dividis la mondon en du partojn — Oriento kaj Okcidento, kaj donis al ili tiom da diferencoj.

Mi loĝis en la Internacia Domo en la universitato. Mia samĉambrano estis Paula Kern, svelta usona junulino kun blonda hararo kaj grandaj okuloj. Ŝi venis de Springfield, ĉefurbo de Ilinojso. Mi enloĝiĝis antaŭ ŝi. Poste ŝi venis kaj diris, ke ŝi estas malsocietema kaj deziras kvietan medion por lernado. Tio estis ankaŭ mia deziro. Montrante la liberan liton kontraŭ la pordo, ŝi demandis min: "Ĉu vere vi ne ŝatas tiun liton?" Mi jesis, ĉar mi ŝatis la lokon malantaŭ la pordo. Mi pensis, ke certe ŝi preferas mian liton.

Ni kunvivis harmonie. Mi ofte demandis ŝin pri iuj usonaj slangoj. Kiel rekompenco, mi instruis al ŝi ĉinajn frazojn. Dum telefonado al sia amato ŝi ofte diris la ĵus lernitajn ĉinajn vortojn kaj petis lin diveni la signifon, kaj ŝi mem ridegis.

Foje ŝi demandis min: "Ying, ĉu vi sentas kulturalan ŝokon?"

Mi sciivolemis: "Kiel vi rimarkis tion?"

"Antaŭe mia samĉambrano estis japana junulino, kiu multe suferis de kultura ŝoko en siaj unuaj tagoj en Usono. Mi rimarkis, ke vi ofte siestas. Laŭ psikologio, kultura ŝoko kaŭ-

zas deprimon, kaj dormo estas vojo por eviti ĝin." Ja ŝi studis en la psikologia fakultato.

Jes, la nova kultura medio ŝokis min. Ekz. en Usono la kunlernantoj loĝis dise, en postleciono tempo ni ne estis kune, kaj estis tre malfacile amikiĝi kun ili. Sed en Ĉinio la studentoj kune studas ne nur dum lecionoj sed ankaŭ en libera tempo. Ili facile interkonatiĝas, iuj eĉ fariĝas amikoj por la tuta vivo. Dum lecionoj en Usono iafoje studentoj trinkas, interrompas la parolon de la instruisto kaj eĉ metas siajn piedojn sur la tablon. Ĉio ĉi estas neimagebla por ĉinoj.

En la dormoĉambro usonaj studentoj ŝatas legi aŭ babili, sidante sur la planko en akompano de brua muziko. Ankaŭ mia samĉambrano tiel faris. Kvankam ŝi mallaŭtigis la sonon, tamen mi ankoraŭ ne povis toleri. Mi devis iri al biblioteko. Ankaŭ mia stomako ne ŝatis la usonajn manĝaĵojn, ĉiuvespere ĝi dolor-

Ren Ying (maldekstre) kaj Paula Kern




is... Estis tre multaj aferoj, kiujn mi ne ŝatis aŭ komprenis. Mi nur ŝatis mediti en vespera krepusko en direkto al Ĉinio. Mi estis hejmsopira.

Eble estas nekredeble por vi — brakumo ŝanĝis min. Mia amikino Jennie Tostch invitis min al la hejmo de sia avino por la Dankofesto. Nun mi ankoraŭ memoras la meleagron rostitan de ili — ĝi estis la plej granda, kiun mi vidis ĝis nun. La avo kaj avino de Jennie demandis min pri miaj familio kaj laboro, pri vidindejoj kaj famuloj de Ĉinio. Parolante pri tio, mi havis humoron pli bonan. Antaŭvespere de la Dankofesto ili gvidis min al preĝejo. Kiam oni starante kantis la psalmon, mi estis metita en kvietan, pacan kaj harmonian etoson. Post la ceremonio oni salutis unu alian. Iu afabla maljunulino salutis Jennie. Kiam ŝi aŭdis de Jennie pri mi, ŝi tuj brakumis min dirante: “Knabino el Ĉinio, ĉu vi hejmsopiras?” Ŝiaj vortoj larmigis min. Mi sentis varmon trakurantan mian korpon. Mi pensis, kial mi ne povas malfermi mian koron al la novaj amikoj. Kial mi ne povas brakumi aliajn?

Paula kaj mi ofte parolis pri diferencoj inter Oriento kaj Okcidento. Mi diris al ŝi, ke pro influo de konfuceanismo en miloj da jaroj, ĉinoj havas karakteron enfermiĝeman. Ekz. en kvadrata korto ĉirkaŭe kun loĝdomoj en Pekino, tuj post la pordo estas ekranmuro por bari la enrigardon de preterpasantoj. Jen kial mi elektis la liton malantaŭ la pordo. Paula diris, ke ŝi tre ĝojis ricevi la liton rigardantan al la pordo, ĉar la lito estis hela, kiam la pordo estis malfermita.

Ĉe la Kristnasko de 1994 nia universitato aranĝis viziton de alilandaj studentoj al Harrisburg, ĉefurbo de Pensilvanio. Ĉiuj studentoj vivis en usonaj familioj por sperti kiel oni festas la Kristnaskon. Tiutage mi ricevis multajn festajn donacojn, kiaj pulovero, sonbendoj kaj ludilo. La najbaroj ofte diris, ke se mi deziras ion aĉeti, ili volontas veturigi min per aŭto. La gastiganta familio varme akceptis min, gaston el malproksima lando. Ĉe la adiaŭo mi brakumis ĉiujn familianojn. De tiam mi ne plu sentis solecon en Usono.

Ja estas multaj diferencoj inter Oriento kaj Okcidento. Ĉe adiaŭo usonanoj diras “Bye-bye” al gasto ĉe la pordo, kaj tiam ĉinoj kutime akompanas gaston al la busohaltejo aŭ taksistacio. Mia usona amiko rakontis, ke foje li gatis ĉe ĉino, kiu post manĝo akompanis lin tre longe dum lia hejmeniro. Li ne



Ren Ying ĉe marbordo en Florida

povis ne demandi humure: “Ĉu vi akompanos min al la doganejo?”

En Usono mi vidis multajn knabinojn fumantajn aŭ parolantajn pri sekso. Ĉinaj knaboj certe ne ŝatas tiajn knabinojn.

Mi trovis ankaŭ, ke usonanoj malmulte konas la eksteran mondon. La usonaj studentoj havas multe malpli da scioj pri la mondo ol la ĉinaj studentoj. Foje en restoracio ni menciis Laoson, kaj usonaj studentoj tute ne konis: “Kie ĝi estas? Ĉu ĝi estas lando?” “Mi neniam aŭdis pri ĝi.” Ĉinaj studentoj konas multajn usonajn ŝtatojn, dum la usonaj nur Pekinon kaj Ŝanhajon.

Iom post iom mi ekŝatis la rapidritman muzikon. Mi ankaŭ komprenis, ke usonanoj ŝatas tian muzikon ĝuste pro la rapidritma vivo. Paula rimarkis mian ŝanĝiĝon: “Ying, antaŭe vi fuĝis al biblioteko, kiam mi aŭdigis muzikon. Kaj nun vi eĉ kantetas kun ĝi.” Mi diris: “Se vi loĝos iom da tempo en Ĉinio, certe vi ekŝatos la muzikon de ĉinaj instrumentoj, kiaj *erhu*-o kaj *geng-o*.”

Antaŭ reveno al Ĉinio mi aĉetis laserdiskojn de kantoj de “Boys II Men”, Madonna kaj Michael Jackson. Iuvespere, kiam mi estis aŭskultanta ilin en mia hejmo en Ĉinio, najbaro venis plendi pri la “bruego”. Tian muzikon malŝatis ankaŭ miaj gepatroj, kiuj diris: “Nur Enya estas akceptebla por ni.”

En Ĉinio mi ofte ricevas leterojn de usonaj amikoj, kiuj diras, ke post konatiĝo kun mi, ili pli kaj pli atentis Ĉinion kaj deziras viziti ĝin. Estas ĝuste la diferencoj, kiuj proksimigas nin, kaj mi kredas, ke Oriento kaj Okcidento certe komprenos unu la alian en interkomunikado. ■

ĈINIO REVIZIOS SIAN EDZECAN LEĜON

En la pasintaj 20 jaroj Ĉinio sukcese praktikis reformadon, pordmalfermon kaj merkatan ekonomion, dume en la kampo de edzeco kaj familioj aperis multe da novaj fenomenoj. El ili estas ja elstaraj la ŝanĝiĝo de la koncepto pri edzeco, tiu de ĝiaj formoj kaj familia funkcio, sed la nuna edzeca leĝo estas pli principca ol praktikeca kaj ne plu taŭgas por komplete reguligi la edzecajn kaj familiajn rilatojn. Ĝuste pro tio Ĉinio decidis revizii ĝin por kompletigi la sistemon pri edzeco kaj familioj en la leĝa sfero.

La ĉi-foja revizio ampleksas multajn enhavojn de la leĝo, sed la publiko atentis ĉefe du el ili: Ĉu la reviziota leĝo plimalfaciligos la divorcon? Ĉu ĝi prenos la reciprokajn fidelecon de la geedzoj kiel ilian devon? Antaŭ nelonge iuj fakuloj montris sian opinion ĉi-kampe.

Multaj fakuloj ne aprobis plimalfaciligon de divorco. Oni diris, ke ekde 1980, kiam Ĉinio ekpraktikis la nunan edzecan leĝon, multe kreskis la nombro de la eksedziĝintoj, sed tio estas neevitebla. Hodiaŭ oni esperas pli multe de la geedziĝo ol iam antaŭe, sed en la reala vivo vere estas edzeco nefortike starigita. Kvankam la kazo pri divorco pro malvirteco ne estas neglektebla, tamen ĝi ne estas la ĉefa kaŭzo, tial troa malhelpo de divorco per leĝaj rimedoj ne estas aprobinda.


Koncerne la reciprokajn fidelecon de la geedzoj, iu fakulino opinias, ke la edzeco mem montras socian pozicion kaj personecon, kaj fideleco ja estas ĝia grava konsistiga parto. Amo estas premiso de edzeco. Ĝi estas rajto kaj ankaŭ devo. Se la geedzoj ne plu amas unu la alian, do malaperas la amo, kaj tiaokaze divorco estas prudenta prefero. En Ĉinio praktikiĝas monogamio kaj la reciproka fideleco ja estas postulata de monogamio. Laŭ tiu principo kaj la publika kaj la kaŝita malobservo de monogamio estas kontraŭleĝa. Profesoro de jura instituto opinias, ke juĝate laŭ moralo estas ja ĝusta la reciproka fideleco de la geedzoj, sed se oni punas tiun konduton, la puno estas malfacile praktikebla. Sed kia estos la edzeca leĝo post revizio? Ni atendas ĝian publikiĝon.

ENKETO DE ĈINAJ FAMILIOJ MONTRAS...

La specimena enketo pri 1 544 familioj en Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono montras, ke hodiaŭ, kiam la urbanaj familioj fariĝas pli kaj pli malgrandaj, iliaj enspezoj devenas ĉefe de la juna aŭ mezaĝa patro. La familioj akiras loĝejon de la entrepreno, kie ili laboras. Kaj sekve de tio ili estas rigardataj kiel familiestroj, tamen multaj el ili ne estas la decida figuro pri la familia kazo, kaj ĉi-flanke ilia edzino ludas la ĉefan rolon, dum iliaj infanoj elspezigas plej multe, precipe gefiloj de malpli ol 18 jaroj. Legu la jenan tabelon:

Praktikanto de la familia ago

speco	ĉefaj praktikantoj			
	juna k. mezaĝa patrino	juna k. mezaĝa patro	avo	Aliaj membroj
familiestran kunvenon partoprenas	38.6%	37.5%	5.5%	5.2%
akiras loĝejon por la fam.	48.2%	23.7%	11.6%	7.1%
laŭvole elektas program. de TV	18.5%	18.5%	14.2%	2.3%
preparas manĝ. por gastoj	19.3%	19.3%	18.3%	6.8%
plej multe elspezas	21.1%	21.1%	19.5%	7.5%
malplej decidopova	8.4%	8.4%	6%	4.7%



108 stupaoj

MODERNA LERNEJO DE KLASIKA KULTURO

“Origine la homoj estis bonkoraj kun similaj karakteroj kaj malsamaj kutimoj”, laŭte recitas geknaboj de la Eksperimenta Elementa Lernejo Shengtao la tekston de la klasika lernolibro “Tri-ideogramaj devizoj”, kiuj cirkulis preskaŭ mil jarojn.

La lernejo estas starigita memore al fama ĉina edukisto Ye Shengtao, kaj plie “shengtao” en la ĉina lingvo havas profundan signifon, t.e. la granda tradicio elbakos eminentajn personojn.

Krom kursoj difinitaj en la instrua programo, la geknaboj de tiu ĉi lernejo lernas pli da klasikaj artikoloj en la ĉina lingvo. Kaj krome, ili lernas ankaŭ *vejĉi*-on, jogon, elementajn artojn de lokaj operoj, sigelilan gravuron, artmetion, ĉin-medicinajn sciojn, kaligrafion, ludon de naciaj muzikiloj k.a. kiuj ampleksas multajn sferojn de la ĉina tradicia kulturo.

“Tri-ideogramaj devizoj”, “Mil-ideograma artikolo”, “Kolekto da familiaj nomoj” kaj aliaj famaj klasikaj legaĵoj estis inicaj lernolibroj en la antikva Ĉinio. La lernejo postulas, ke ĉiu lernanto povu reciti ilin kaj la lernantoj de la klasoj 2-a kaj pli altaj povu legi simplajn klasikajn verkojn kaj la geknaboj diplomitaj el la elementa lernejo povu parkere reciti almenaŭ 300 antikvajn literaturajn verkojn, ekspliki la verkojn kaj prezenti siajn proprajn opiniojn pri tiuj verkoj.

La gepatroj donas grandan atenton al perspektivo de siaj infanoj. Patro de iu lernanto diris: “Mi iam laboris eksterlande kaj rimarkis, ke multaj ekster-

landanoj interesigas pri la tradicia kulturo de Ĉinio. Se ni mem malbone konas ĝin, ili malestimas nin.” Informiginte pri la instrua kvalito, kotizo kaj aliaj faktoroj, li sendis sian filon al la elementa lernejo Shengtao por ke tiu altigu lian sintezan kvaliton.

108 STUPAOJ

En la meza baseno de la Flava Rivero situas la urbo Qingtongxia, kie sur kruta montodeklivo estas triangula formacio el 108 stupaoj.

La stupaoj rigardas orienten al la rivero. Ili sidas sur ŝtonaj ŝtupoj kaj formas egallateran triangulon.

La stupaoj, el teraj adoboj kun ligna kolono meze interne kaj brikoj ekstere, estas blanke kalkitaj. Ili imponas sur montodeklivo. Nun oni ne scias, en kiu jaro oni konstruis la unuan stupacon tie, tamen el la silka letero trovita en la stupaa bazo en 1960 oni scias, ke en la Okcidenta Xia-regno (fondita en 1038) furoris budhismo kaj tiam budhismaj temploj troviĝis preskaŭ sur ĉiuj famaj montoj. Tiam en la regno furoris ankaŭ lamaismo. Oni supozis, ke la stupaoj eble aperis ĝuste en la Okcidenta Xia-regno. Budhisma sutro asertas, ke estas 108 homaj ĉagrenoj kaj la 108 stupaoj kun budhismaj karakteroj estis konstruitaj por memorado. Por forpeli la ĉagrenojn la bonzoj devas porti rozarion el 108 bidoj kaj ĉiutage murmuri la budhan nomon 108 fojojn kaj ĉiumatene bati 108 fojojn sonorilegon. La nomita stupaa formacio estas prenata kiel grava protektata historia objekto de la ŝtato.



Vizito en la regiono de la ĉinaj kore-nacianoj

Kore-nacia vilaĝo

de DU DIANWEN

EN Yanji, ĉefurbo de la Yanbian-a Kore-nacia Aŭtonoma Subprovinco en Jilin en la nordoriento de Ĉinio, oni ofte vidas aŭtoĉenojn en la korea lingvo kaj restoraciojn de koreaj gustoj, kaj en vendejoj oni povas trovi kore-naciajn kostumojn kaj objektojn. Tie mi forte perceptis, ke la loko draste diferencas de aliaj lokoj de Ĉinio.

KORE-NACIA VILAĜO XINTUN

La nunaj koreoj plejparte estas posteuloj de elmigrintoj el la Korea Duoninsulo. Historia libro notis, ke en la lastaj jaroj de la 17-a jarcento loĝantoj de Koreio elmigris en Ĉinion kaj sin okupis per terkulturado. En la mezo de la 19-a jarcento, la registaro de Qing-imperio abolis la malpermeson de transmigrado kaj praktikis la politikon "prosperigi limregionon per transmigrantoj", kaj krome sinsekvaj naturaj katastrofoj okazis kaj imperiismaj potencoj invadis, sekve multaj koreoj translimiĝis kaj en-

loĝiĝis en Ĉinio. Ili ja estas la ĉefa parto de la prapatroj de la nuna korea nacio en Ĉinio kaj en 1952 la ĉina registaro fondis la Yanbian-an Kore-nacian Aŭtonoman Subprovincon en Jilin. Tie loĝas plejparto de la kore-nacianoj de Ĉinio, sume 890 mil.

La enmigrintaj koreoj plejparte loĝis en la basenoj de la riveroj Tumen kaj Yalu. La koncentra loĝado kaj relative longa sinfermo al la ekstero bone konservis la tradician kulturon de kore-nacio.

En la vilaĝo Xintun de Antugubernio grandaĝulo Jiang Yonghong diris al mi, ke ilia vilaĝo formiĝis en 1938 el enmigrintoj de la suda Koreio. Li diris, ke la skalo de la vilaĝo estas preskaŭ sama kiel antaŭe. La vilaĝanoj ne havas evidentajn ŝanĝojn en produktado, ĉiutaga vivo kaj moro. Ĉu antaŭe, ĉu nun, ilia vivo dependas de rizo. La pajlaj tegmentoj estas anstataŭigitaj per la tegolaj, sed la formo de la domoj kaj internaj dispozicioj restas preskaŭ samaj kiel antaŭe, kaj la brika-ŝtona lito estas tute sama kiel antaŭe, malmulte ŝanĝiĝis la moro kaj kutimoj en la ĉiutaga vivo.

S-ro Jiang aĝas 75 jarojn. Li forlasis hejmlokon en la aĝo de 15 jaroj. Li povas skribi la adreson de sia hejmloko per ĉinaj ideogramoj, ĉar li lernis ilin en sia knabeco. En la lastaj jaroj nemalmultaj vilaĝanoj vizitis siajn parencojn en Koreio.

SESDEK-JARIĜA FESTO

Multaj kore-nacianoj ĝuas longan vivon kaj tie oni havas Sesdek-jariĝan Feston.

En mia vizitado mi ĉeestis celebradon de Sesdek-jariĝa Festo de paro da maljunaj geedzoj. La maljunulo Cui Longshan estas emeritiĝinta instruisto kaj lia edzino — dommastrino. Ambaŭ aĝas 67 jarojn. Sed antaŭ 7 jaroj, kiam ili estis 60-jaraj, la familio ne havis sufiĉan monon por festeni. Nun la familio havas pli kaj pli grandan enspezon kaj la gefiloj de Cui decidis aranĝi celebradon por esprimi amon kaj respekton al siaj gepatroj. Tiutage, akompanate de la gefiloj, la maljunuloj venis al la urbocentro. Ili faris rondiron ĉirkaŭ la drako-puto fosita de la unua generacio de enmigrintoj por simboli sopiron kaj oferon al la pra-



En bazaro

patroj. Poste ili venis al luksa restoracio, kies vestiblo estis feste ornamita kaj iluminata. Sur tabloj estis diversaj manĝaĵoj, fruktoj kaj ankaŭ dolĉaĵoj el puĝigita rizo, ĉar kore-nacio estas nacio dumlonge kulturanta rizon. La geedzoj sidis sur la honoraj lokoj kaj ambaŭflanke akompanis la plej respektataj parencoj kaj grandaĝuloj. Tiutage venis gratuli pli ol 200 parencoj kaj amikoj. Kiam la geedzoj iris en la vestiblon sekvate de la gefiloj kaj genepoj, oni disflugigis kolorajn konfetojn kaj eksplodigis petardojn. La gratulantoj varme aplaudis kaj ĉiuj ĝoje ekdancis. Dum festeno ili multfoje tostis por la sano kaj longa vivo de la geedzoj.

S-ro Cui diris al ni, ke nun kore-naciaj familioj prenas la sesdek-jariĝan feston kiel gravan konsistigan parton de la vivo.

PONTO INTER LA ĈINAJ KOREOJ KAJ KOREA RESPUBLIKO


Post starigo de la diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj Korea Respubliko, Yanji fariĝis frekventejo de turistoj kaj investantoj de la Korea Respubliko. Tie ni vidis turistajn grupojn, entreprenojn kaj tre abundajn komercaĵojn de la Korea Respubliko.

En Yanji estas sud-korea To-

woo-kompanio limigita, kiu produktas vibromotoron de televokilo. La kompanio havas 6-etaĝan domon. La laborejoj estas grandaj, ekipaĵoj modernaj kaj la personaro

bone trejnita. Ĉina respondeculo de la kompanio diris al mi, ke la kompanio establiĝis en 1995 kaj la produktado iras tre bone, kaj nun ĝi produktas ĉiujare 2.4-3 milionojn da motoroj. Li diris al mi ankaŭ, ke la korea mastro ne ofte venas al la kompanio kaj rolas ĉefe ĉinaj kore-nacianoj. Pri la sukceso de la kompanio, li diris, ke la kompanio atribuas tion al la subteno de la lokaj instancoj kaj al la diligenteco de la tuta personaro, kaj ankaŭ al la avangarda teknologio, scienca administrado kaj vigla sin-etendo al la internacia merkato. Mi informiĝis de li, ke en Yanji oni nombras pli ol 300 tiajn entreprenojn fonditajn en la pasintaj kelkaj jaroj. Efektive Yanji jam fariĝis fenestro por koni la vivon de la ĉina kore-nacio kaj ponto aŭ interligilo inter la ĉinaj koreoj, la Korea Respubliko kaj la Korea Popol-demokratia Respubliko. ■

Por la Sesdek-jariĝa Festo de maljunulo



Interesaj ciferoj en la ĉina lingvo

de ZHANG QICHENG

UNU el la specifaj kaj mirindaj fenomenoj de la ĉina lingvo estas, ke en ĝi troviĝas abundaj ciferoj ne kiel kalkulaj rimedoj sed kiel lingvaj elementoj por riĉigi la esprimon aŭ emfazi la efikon de la parolo.

Iu ĉina aŭtoro skribis, ke la civilizacio komenciĝis de skriba lingvo, la skriba lingvo de ciferoj kaj la ciferoj de "1". En pratempo ĉinaj filozofoj konsideris, ke "1" estas la origino de ĉiuj estaĵoj, kaj donis al ĝi tre imponan nomon "Taiji", kiu signifas "la plej granda kaj senlima". Fakte, ĝi estis ia nenomebla primitiva elemento, kiu formis la universon. Kaj dank' al "Taiji", estiĝis la ĉielo kaj tero, suno kaj luno kaj samtempe la t.n. "Yin" kaj "Yang" (femalo kaj masklo), kaj ankaŭ la homoj, animaloj kaj vegetaloj. Laŭdire, ĉu en oriento ĉu en okcidento, la prahomoj rigardis la neparan ciferon maskla kaj la paran femala. Mi ne scias, ĉu estas sama opinio en aliaj partoj de la terglobo, tamen mi povas aserti, ke almenaŭ en Ĉinio. Oni dividis la ciferojn en femalajn kaj masklajn, eĉ nun oni ankoraŭ aplikis tiun koncepton en ia okazo, ekz., sur la identeca karto por ĉiu ĉina civitano estas presita longa vico da ciferoj, kaj se la lasta cifero estas nepara, tio indikas ke la koncerna persono estas viro. Kompreneble, la nuntempaj ĉinoj ĝenerale ne havas tiun koncepton.

Ĉar "1" estas la unua nepara cifero, ĝi estas pli favorata de ĉinoj. En la ĉina lingvo multaj idiomaĵoj kaj proverboj komenciĝas per "1", ekz., "unuigi la tutan landon", "unu movo, du gajnoj" kaj "je la unua vido ili enamiĝas". Ankaŭ "1" enhavas la signifon de tuto, ekz., "unu korpo plenas de kuraĝo", tio signifas ke "la tuta korpo estas kuraĝoplena"; "li unu vivon malfeliĉis" signifas ke dum la tuta vivo li havis diversajn malfeliĉojn.

Eble pro tio, ke ĉinoj ŝatas unuiĝon kaj ne disiĝon, oni pli ŝatas "1" ol "2", ĉar "2" signifas ke "1" dividiĝas en "2". Sed, se "2" kuniĝas en "1", oni multe ŝatas tiun "2". Ekz., kiam du personoj (gejunuloj) fariĝas geedza paro, tio estas ege ĝojinda

kaj duoble gratulinda. En la ĉina lingvo troviĝas la ideogramo "xi" (feliĉa aŭ ĝojinda), kaj okaze de la geedziĝa ceremonio oni ofte skribas tiun ideogramon duope kaj nomas ĝin "shuang-xi" (duobla ĝojo).

Fama ĉina historiisto Sima Qian (ĉ. 145 a.K. — ?) skribis jene en sia verko pri ciferoj: La ciferoj komenciĝas de "1", finiĝas per "10" kaj plenkreskas ĉe "3". Tio signifas, ke nur dank' al "3", la ciferoj maturiĝas. Laŭ la esploro de fakuloj, en la plena ĉinlingva vortaro troviĝas proksimume ducent vortoj kaj vortogrupoj, kiuj komenciĝas per la ciferoj "3", kaj multaj el ili havas la signifon "pluraj". Ekz., en la idiomaĵo "vi devas agi post trifoja pripensado," la esprimo "trifoja" ja havas la sencon "plurfoja". Kaj kiam Majstro Konfuceo troviĝis en malfacila situacio, li eĉ en tri monatoj ne konis la guston de viando, tio signifas ke li ne havis viandon dum longa tempo.

La cifero "4" estas ne multe ŝatata ĉefe pro tio, ke en la ĉina lingvo ĝia elparolo estas sama kiel la vorto "morti". Tamen oni tute ne evitas ĝin, ĉar tiu cifero tre utilas por la ĉiutaga vivo. Antaŭ ĉio, ĉiu jaro konsistas el kvar sezonoj, kaj la meteorologiaj ŝanĝiĝoj dum la kvar sezonoj tre gravas por la agrikultura lando Ĉinio. Geografie, oni havas kvar direktojn, nome, oriento, sudo, okcidento kaj nordo, kaj ankaŭ kvar angulojn de la direkto, nome, sudoriento, sudokcidento, nordokcidento kaj nordoriento. Por la homoj tiuj "kvar" estas tute neeviteblaj.

Oni supozis, ke antikve oni kalkulis per sia mano, per la kvin fingroj de unu mano li kalkulis de 1 ĝis 5, kaj per du manoj la ciferoj finiĝis per "10". Sekve, aperis la decimala nombrosistemo. En tiu sistemo la cifero "5" estas kvazaŭ ronda nombro kaj valoras por la ĉinoj. En Ĉinio oni kutime festas jubileon okaze de kvinjariĝo (dekkvin, dudekkvin...) de la ŝtato, organizo, revuo ktp.

La antikvaj ĉinoj konsideris, ke ĉiuj estaĵoj en la mondo estas formitaj el kvin elementoj, nome, akvo, fajro, ligno, metalo kaj grundo, kiujn la ĉinoj nomas "wuxing". Oni kredis, ke tiuj kvin elementoj plus la genroj masklo kaj femalo funkcias en ĉio vivanta. Ili eĉ influas la sorton de homoj kaj la aŭguristoj kutime

aplikis ilin en sia divenado.

Estas interese, ke la antikvaj ĉinoj konsideris, ke la kvar direktoj ne estas kompletaj, devas esti ankaŭ la direkto “centro”, kaj tiu “centro” estas tre grava por ĉinoj, ĉar oni asertis, ke Ĉinio ja situas ĝuste en la centra parto de la tero. Tiel aperis kvin direktoj, kaj el tio oni havas la idiomaĵon “homoj el kvin direktoj miksiĝe loĝas kune.”

Ĉar en la ĉina lingvo la cifero “6” prononciĝas simile al la vorto “lu”, kiu signifas altrangan postenon, bonan salajron kaj noblan socian statuson, la antikvaj ĉinaj kleruloj ja ege ŝatis tiun ciferon. Aliflanke, la ordinaraĵoj ŝatis ĝin ĉefe pro tio, ke ĝi enhavas la sencon “bonŝanco” aŭ “favoro”.

Por la ĉinaj kamparanoj la ciferoj “5” kaj “6” gravas pro tio, ke la riĉa rikolto de la 5 grenoj (rizo, milio, maizo, tritiko kaj fabo) kaj la abunda plenkreskado de la 6 brutoj (porko, bovo, ŝafo, ĉevalo, koko kaj hundo) signifas belan kaj feliĉan vivon, kiun ili deziras.

Parolante pri la cifero “7”, mi unue prezentas la interesan kaj popularan miton pri du steloj: ĉe la orienta flanko de galaksio loĝis teksistino, filino de la ĉiela suvereno. Ŝi sin okupis pri teksado kaj ne havis tempon por sin ornami. Ŝia patro kompatis ŝin pro ŝia soleco kaj permesis al ŝi edziniĝi al juna bovisto, kiu loĝis ĉe la okcidenta flanko. Post la edziniĝo ŝi tute ĉesigis teksadon, kaj tio kolerigis la patron. Li ordonis, ke ŝi revenu al la orienta flanko, sed promesis, ke la geedzoj renkontiĝu unufoje ĉiujare en la sepa nokto de la sepa monato laŭ la ĉina luna kalendaro. Tiu teksistino tre lertis ne nur en teksado, sed ankaŭ en ĉiuj artoj de kudrado. Do, la virinoj kultis ŝin en tiu nokto, por ke ŝi donu al ili lertecon. Kaj tiun aktivadon ili nomis Festo de Lerteco-peto.

La valoro de la cifero “7” montriĝis ankaŭ en tio, ke antikve la ĉinoj, en sia observado de astronomiaj fenomenoj, trovis ke la Granda Ursino formiĝas el sep steloj, kaj laŭ la direkto de la Granda Ursino oni povas trovi la Polusan Stelon, kie situas la trono de la ĉiela suvereno. Tio montras, ke estas tre prestiĝa la Granda Ursino en la okuloj de antikvaj ĉinoj.

En pratempo “8” estis rigardata de ĉinoj kiel magia cifero, ĉar jam tiam estis la t.n. “ok diagramoj” formitaj el strekoj longaj kaj mallongaj por indiki masklon kaj femalon respektive. Laŭdire, per ili oni povas aŭguri diversajn okazontaĵojn.

Ankaŭ la mito pri la ok feoj estas tre populara. Laŭ tiu mito, tiuj feoj povis transpasi la maron ne per ŝipo, sed ĉiu per sia magia objekto. Ekz., la lama feo Li ĵetis sian lambastonon en la maron kaj trankvile staris sur ĝi kaj finfine sukcesis atingi la alian bordon. El tiu mito devenis la idiomaĵo: “La ok feoj ĉiu havas sian magian rimedon por transpasi la maron.” Tiu idiomaĵo aludas, ke diversaj homoj ja povas per siaj propraj scioj kaj lerteco plenumi ian komunan

taskon.

Rilate la ciferon “9”, mi devas antaŭ ĉio menciigi epizodon antaŭ 4 000 jaroj: la unua reĝo Yu de Xia-dinastio (ĉ. 2 100-1 600 a.K) heredis la regpotencon de Shun pro sia merito bridi la superakvegion, kiu inundis la tutan landon. Li dividis Ĉinion en naŭ distriktojn kaj poste muldis naŭ grandajn *ding*-ojn (antikva vazo por kuiri) el bronzo kiel simbolojn de la naŭ distriktoj. Sekve, “Naŭ Distriktoj” fariĝis sinonimo de Ĉinio kaj la naŭ *ding*-oj — simbolo de regpotenco.

“9” estis vere la sankta cifero en la antikva Ĉinio, ĉar ĝi estis rigardata kiel la ĉiela cifero kaj taŭgis por reprezenti la ĉielon. En la Ĉiela Altaro de Pekino estas ronda teraso, sur kiu la imperiestro kultis la ĉielon per solena ceremonio. Tiu teraso havas tri etaĝojn. Ĉiu etaĝo havas ŝtuparon el 9 ŝtupoj ĉirkaŭe. Meze de la supra etaĝo estas ronda ŝtonplato. La unua rondo ĉirkaŭ ĝi havas 9 ŝtonplatojn, la dua — 18, la tria — 27, la kvara — 36, la kvina — 45, la sesa — 54, la sepa — 63, la oka — 72, kaj la naŭa — 81. Rimarkindas, ke la adiciitaj ciferoj senescepte estas “9”. Rigardu: $1+8 = 9$, $2+7 = 9$, $3+6 = 9$... $8+1 = 9$. Tia projektado plene montras la ekstreman majestecon de la ĉielo kaj ankaŭ tiun de la imperiestro. Eble multaj turistoj, fremdlandaj kaj enlandaj, vizitante la Ĉielan Altaron, ne rimarkis tiun mirindan projektadon.

“10” estas perfekta ronda nombro. Sendube ĝi estas aparte atentata de ĉinoj. La idiomaĵo “dek kompletcoj kaj dek beloj”, kiu estas ofte uzata por laŭdi perfektan aferon aŭ estaĵon, sufiĉas por montri la valoron de tiu cifero.

En la ĉina lingvo troviĝas la speciala cifero “wan” (dekmil). Anstataŭ la vorton “Vivu!” la ĉinoj huraas “wansui” (dekmil-jariĝu). Kaj “wan-fen” estas uzata por esprimi “ege” aŭ “ekstreme”, ekz., “wanfen xiaoxin” signifas “ege singardema”. Alia ofte uzata vortgrupo “wanzhong-yixin” esprimas unuanimecon de la tuta popolo, ĉar “wanzhong” signifas dekmil-ojn da popolanoj kaj “yixin” (unukore) signifas “unuanimecon”.

Por esprimi ian sencon, la ĉinoj ofte aplikas du diferencajn ciferojn kune, ekz., “du-tri vortoj” por esprimi tre mallongan parolon; “kvin-ses koloroj” signifas kolororiĉecon; “sep buŝoj kaj ok langoj” esprimas, ke multaj personoj konkure parolas por prezenti siajn opiniojn; kaj “unu haro el naŭ bovoj” estas uzata por figuri tre malgrandan sumon aŭ bagatelan aferon.

En tiu ĉi artikolo mi prezentas nur tre malmultajn ekzemplojn rilate la specialan rolon ludatan de ciferoj en la ĉina lingvo, ĝuste kiel la idiomaĵo diras, ili estas nur “unu grajno en vasta maro”. Tamen mi pensas, ke ili sufiĉas por komprenigi la legantojn, ke la ĉinoj jam kelkmil jarojn vivis en la mondo de ciferoj. ■




Landlima urbeto

Landlima pasejo en Erenhot



Aĉetantoj el Mongolio

Komercistino pri murtapiŝoj



Erenhot

Fotoj de ZHAO XI

Situante en la nordo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio en Ĉinio, Erenhot estas la nepre trairata loko de la internacia fervojo Peki-no-Ulanbatoro-Moskvo.

Kun 9 kvadrataj kilometroj kaj 13 mil loĝantoj, Erenhot ne havas aŭtobuson. Tie funkcias nur tricikloj, kiuj ĉiufoje pagigas unu juanon. Tie ne estas bruego nek polucio kaj ĉie vidiĝas arboj kaj floroj.

En- kaj ekster-landaj komercistoj ofte vizitas la lokon. Ĝi jam fariĝis prospera komerca urbeto ĉe la landlimo. Tie funkcias fama ĉina-mongola fiaro kun 1 200 standoj, kiuj ampleksas 42 mil kvadratajn metrojn. Ĉiutage ĉ. 30 mil ĉinaj kaj alilandaj turistoj vizitas la urbon, kies jara komerca valoro estas 130 milionoj da juanoj. Vestoj, ĉapoj, ŝuoj kaj aliaj ĉiutagaj bezonaĵoj estas ŝatataj de mogolaj kaj rusaj komercistoj.



En foirejo

Tricikloj estas ĉefaj trafikiloj en la urbo.



Kreski kun ludiloj

de XIANG HONG

ĈIUJ infanoj ŝatas ludilojn. En la Internacia Infana Tago (la unua de junio) la infanoj facile akiras de siaj gepatroj aŭ glitŝuojn, kiujn ili deziras unu jaron, aŭ baterian konkursoĉaron nove fabrikitan, ĉar en tiu tago oni ne devas rifuzi al ili.

Ludiloj akompanas la infanojn dum ilia kreskado kaj ludas por ili gravan rolon. Iuj diris, ke ludiloj estas anĝelo por la infanoj; aliaj opinias, ke ludiloj estas la unua lernolibro por ili; triaj trovis, ke en ludiloj sentiĝas estonteco de la infanoj. Kiu povas diri, ke la homoj kreskas ne dum ludado, nek kun ludiloj?

EN LA MONDO DE LUDILOJ

Irinte en la mondon de ludiloj, oni rimarkis, ke tie fakte estas miniaturo de tiu de plenkreskuloj.

Knabinoj ege amas Babi-pupon pro ĝiaj interesaj vivmanieroj — ĝi portas bankostumon dum naĝado kaj ceremonian veston por vespera renkontiĝo; oni devas prepari por ĝi arĝentan servicon dum bankedo; kompreneble, fridujo kaj tualeta tablo estas nemankigeblaj; adoleskinte, ŝi devas fianĉiniĝi kaj finfine, oni lasas ĝin naski idon. Tiu ludo ebligas al la knabinoj sperti la homan vivon de kreskado.

Iu 8-jara knabo scias la nomon de preskaŭ ĉiuj aŭtoj cirkulantaj en Pekino: Hongqi, Audi, Benz... ĉar en ŝranko de liaj ludiloj estas multe da modeloj de malmunteblaj aŭtoj kaj konkursoĉaroj. Kiam lia patrino ankoraŭ ne eliris el la emocio de la amrakonto "Titanic", li jam komencis munti sian luksan

"Titanic". Hodiaŭ lin tiklas skotero kaj akumulatora ĉaro, kiujn li povas mem konduki. Li neniam pripensis, ĉu lia ĉambro estas sufiĉe granda por tiuj ludiloj.

Vilao, aŭto, kato, hundo, ŝranko por instrumentoj... Infanoj posedas ĉion, kion havas adoltoj kaj eĉ tion, kion adoltoj ne povas havigi al si. En la mondo de ludiloj infanoj ludas la rolon de lokomotivestro, policano, kuracisto, flegistino k.a.

KUNE LUDAS INFANOJ DE LA MONDO

Ĉina infano eble ne scias, ke en la mondo estas ankaŭ aliaj landoj, krom la urbo, kie li vivas, sed probable, li estas plektanta beston el miriga ŝnureto fabrikita en Britio, aŭ muntanta Lego-ludobrikoj fabrikitaj en Danlando; infanoj vivantaj en Usono kaj Eŭropo, kiuj neniam vizitis Azion, eble ne scias, kie estas Ĉinio kaj Japanio, sed probable ili iam ludis kun elektronaj bestoj kaj pluŝaj ludiloj, sur kiuj eble troviĝas la vortoj "Fabrikita en Ĉinio".

La integriĝo de la terglobo interese kaj vivece enkorpiĝas en la mondo de ludiloj. Infanoj kun flava haŭto estas nedisigeblaj de pupoj kun blondaj haroj, verdaj okuloj, bruna haŭto kaj alta nazo; infanoj en diversaj lokoj de la mondo eble sopiras pri dinosaŭro-ludilo, transformeblaj ludiloj kaj robotoj. Estas multe pli facile por la infanoj el diversaj landoj ol por adoltoj trovi komunan lingvon kaj amikiĝi pro ludiloj en la manoj. En la aĝo de ses jaroj Yingying, naskiĝinta en Britio, venis en Pekinon kune kun siaj gepatroj. Mallerta en parolo

en la ĉina lingvo, ŝi multe sopiris pri britaj amiketoj dum longa tempo. Poste, ŝi rimarkis en la hejmo de Gege la ludilon "Hoki fiŝon sur glacio" vaste konatan en Britio. Dum ludado Yingying amikiĝis kun Gege kaj dank' al la lasta ŝi amikiĝis kun multaj infanoj.

KRESKI KUNE KUN LUDILOJ

Ankaŭ por ni estas neforgeseblaj iuj ludiloj, eble tio estis pupo ne tiel bela aŭ papera aviadilo farita de la patro... kiu aspektis multe pli simpla kaj kruda ol la hodiaŭaj multekostaj, tamen ĝi alportis ĝojon al ni. Sendube la ludiloj fabrikitaj en la 21-a jc. multe pli diversos kun altaj sciencoj kaj tekniko utilaj al ekspluatado de intelekto de infanoj, sed por la infanoj la signifo de ludiloj estas neŝanĝebla, t.e. ludiloj akompanas ilin en la kreskado.

Ĝuste pro tio la gepatroj ĉiam elektas por la infano ludilojn, kiuj alportas ne nur plezuron, sed ankaŭ pli da utiloj. Do, pli kaj pli multas la ludiloj karakterizitaj de inspiro al cerbumado kaj intelekto. Ekz., kun la lignobriketoj el pli ol 600 pecoj infanoj povas komponi laŭ siaj imago kaj volo diversajn objektojn, kiaj buldozo, ronda kastelo kaj homfiguroj, kiuj povas sidi kaj stari sur la genuoj. Iuj gepatroj donacis ludilojn al la infano kun espero konduki tiun al la vojo, kiun ili deziras. Tio eblas. Kiu povas diri, ke la infano, kiu faris per la malgrandaj manoj bestojn el mastiko, ne povos krei eksterordinarajn artaĵojn en la estonteco? Kiu povas certigi, ke la hodiaŭaj piano kaj desegnotabulo ne kulturos estontajn Beethoven kaj

Picasso? Plie, la ĉarmaj projektoj de la gepatroj ne malhelpas al la infano sin distri kaj kreski dum ludado.

EMBARASO DE LA GEPATROJ

Kiam ludiloj pli kaj pli diversas kaj multe kostas, nemalmultaj gepatroj ofte falas en embarason antaŭ la rigardo de la infano plena de aspiro: Ĉu ili aĉetu aŭ ne? Se ne, malĝojos la infano; se jes, mono ne sufiĉas.

Enketo montras, ke en grandaj ĉinaj urboj la elspezo por malpli-ol-12-jaraj infanoj konsistigas 30% de la totala enspezo de la familio. Tiu por ludiloj okupas la duan lokon nur post tiu por manĝo kaj vestoj. La infanoj en Pekino, Ŝanhajo, Kanton, Chengdu kaj Xi'an konsumis en unu jaro kvar miliardojn da juanoj sole por ludiloj.

La gepatroj opinias, ke sur la



En pekina ludilo-vendejo

nuna ĉina merkato la malmultekostaj ludiloj, ĝenerale dirite, ne estas preferindaj, dum la preferindaj ludiloj estas tro valoraj. Por ili, la idealaj ludiloj devas esti interesaj, utilaj al inteligenteco

kaj ne tro valoraj. Havigi al infanoj altklasajn ludilojn, kia aŭtoludilo kun marko Benz, kiu vendiĝas je 600 juanoj, fakte estas super pagipovo de multaj gepatroj. ■

(Daŭrigo de p. 35)

la lukrita mono. Amiko demandis lin kun miro: "Por kio vi forlasis la postenon de lernejestro kaj prenis sur vin tiel lacigan aferon?" Sed Wang Hualin neniom ŝanceliĝis, ĉar li eĉ volontos esti almozulo por kelka tempo, nur se li spirite estos riĉa.

Lia originala administrado kaj unuanima servado al la legantoj disportis la famon de la societo kaj lia legoĉambro estas frekventata de multaj homoj. Foje kelkaj sinjoroj de pli ol 80 jaroj kune venis al la societo kaj eklaŭdis Wang tuj enpaŝinte en la ĉambron: "Brave, brave! Vi faris meritoplenan aferon por nia urbo!" Juna Wang estis profunde emociita kaj plifirmiĝis lia decido pli bone prizorgi la societon.

Post unu jaro la sidejo de la societo dekoble pligrandiĝis, kaj la societo nombris pli ol 30 000 librojn kaj pli ol 300 specojn da gazetoj. Lia societo servis 8:00-22:00 kaj estis senĉese frekventata. La vizitantoj povas trovi bezonatajn librojn en la kolekto sur la dekoj da librobretaroj. Mastroj de entreprenoj ŝatas legi librojn riĉajn je ekonomiaj informoj, studentoj interesiĝas pri kulturaj kaj filozofiaj libroj, iu pentristo trovis ŝatatan "Skulpturon de la

mondo"... Wang Hualin multe atentis iun hazardludemulon. Li ofte rekomendis al tiu legindajn librojn kaj fine sukcesis turni lin en legemulon. Tiu diris al siaj kunludantoj, ke li adiaŭis hazardludon kaj trovis legadon plej plezura. Wang Hualin prizorgas ankaŭ kamparanojn en foraj montoj. Li ofte sendas al ili librojn pri agrikulturo.

Lian legoĉambron frekventis geknaboj en vintraj kaj someraj ferioj. Wang estis ĝoja kunesti kun la infanoj. Li rigardis sin ankoraŭ instruisto kaj respondis ĉiujn iliajn demandojn. Li aranĝis kunsidon por ke la infanoj povu interkomuniki. La lernantoj tre amis la lokon kaj skribis en la not-kajero: "Mi volas legi 'Elementlernejan Matematikan Konkurson'." "Bonvolu havigi pli da gazetoj pri pilkoludo!" Wang Hualin ĉiamaniere kontentigis iliajn postulojn. Li neniom tediĝis de tio kaj diris, ke lia celo estas: Unuanime servi al la legantoj, por ke ili unuanime legu. Li planis, ke en la 2000-a jaro lia legoĉambro grandiĝos ĝis 1 000-kvadratmetra kaj lia librokolekto nombros 300 000 ekzemplerojn. Krome li planis ankaŭ apliki mikrokomputeran administradon kaj establi surretan legadon, por ke la loĝantoj de Meishan pli multe sciu la eksteran mondon. ■

Medito ĉe finiĝo de la 20-a jarcento

de PANG NAIYING

ĈE la sojlo de la nova jarcento iuj atendas ĝin esperplene, tamen aliaj zorgoplene: "Ĉu la terglobo destruiĝus iun tagon en la estonteco?" Iu erudito konjektis, ke la homaro eble pereos pro tri kialoj: 1. nuklea milito; 2. morto de mikroboj, kiuj grave influas la naturon kaj la homaron; 3. kolizio de la terglobo kun astroj. Tamen mediologoj opinias, ke malboniĝo de la medio estas pli danĝera ol nuklea milito.

"KANCERO" DE LA TERGLOBO

Oni rigardas loĝantaran eksplodon kiel "akmean kanceron" de la terglobo. En la komenco de la unua jarcento, la tutmonda loĝantaro nur estis 0.3 miliardo, kaj en la 20-a jarcento tiu rapide ekspansiĝis laŭ geometria progresio, kaj atingis 6 miliardojn en 1999. Kvankam nun

averaĝe unu virino naskas tri bebojn, jam je 3 malpli multe ol antaŭe, kaj post 20 jaroj la loĝantaro de Norda Ameriko kaj Orienta Azio stabiliĝos, kaj en la sekvantaj 50 jaroj tiu de Eŭropo malmultiĝos, tamen tio neniel solvos la problemon de loĝantara eksplodo, ĉar 95% de la nove kreskinta nombro de la loĝantaro en la venontaj 30 jaroj estos en disvolviĝantaj landoj, precipe en la malriĉaj landoj en la regiono sude de Saharo: nun la nombro de la loĝantoj en tiu regiono estas malpli ol 0.7 miliardo, sed en la jaro 2050 tiu atingos 1.7 miliardojn.

Kio sekvas "loĝantaran eksplodon"? Manko de greno kaj loĝdomoj, malfacilo de trafiko, senlaboreco... Pro la limigo de terspaco kaj riĉfontoj konfliktoj okazos neeviteble por ekzistado. Ĉio ĉi tio por la homaro estas bedaŭrinda kaj tragedia.

Sciencistoj taksis, ke la terglobo povas vivteni 8 miliardojn da ho-

moj, maksimume 12 miliardojn. Kiam la loĝantaro atingus la akmeon, preskaŭ 5 miliardoj da homoj malsatus pro manko de greno, kaj la medio grave malboniĝus. Fakte nun la tro granda loĝantaro jam kaŭzis seriozan ekologian krizon.

ŜRUMPANTA "PULMO" DE LA TERGLOBO

Arbaro, kiu konservas teron kaj akvon, reguligas la klimaton kaj estigas oksigenon, estas nomata "pulmo" de la terglobo. Sed en la 20-a jarcento, la areo de arbaroj rapide reduktiĝis de 8 miliardoj da hektaroj al 2.8 miliardoj da hektaroj.

Ĉiujare la homaro ellasas 6 miliardojn da tunoj da karbona dioksido kaj sulfurilo. Julie de 1995 iu televizia stacio raportis, ke en iu lando ĉiujare 11 mil homoj mortas pro aera poluo. Super la norda mezvarma zono difuziĝas 20 milionoj da tunoj da freono, tio grave detruas la ozonon, tial multobliĝis la nombro de suferantoj de haŭta kancero. La sciencistoj, kiuj esploris sur Antarkto, rimarkis ke la "forceja fenomeno" kaŭzita de area poluo degeligas glacieron kaj neĝon dike tegantan insulon Ross, kaj tie 4 200 kvadrataj kilometroj da glacio rompiĝas, kaj la temperaturo estas je 2.5°C pli alta ol antaŭe. Se tiu situacio ne ŝanĝiĝos, en la 21-a jarcento la temperaturo de la tuta mondo altiĝos je 3.5°C. Ne subtaksu tiun malgrandan ŝanĝiĝon, ĉar ĝuste tio estas lulilo de inundo, sekegeco, arbara brulego, eĉ altiĝo de maro, kio povas engluti insulojn kaj ĉemarajn vilaĝojn...

"LA KNABO" LUDAS LA TERGLOBON

Sud-Amerikaj fiŝistoj antaŭlonge rimarkis, ke en kristnaskaj tagoj je 3-6°C altiĝas la temperaturo de la akvo en la maro ĉe Ekvadoro kaj Peruo, kaj suden kuras varma oceana fluo. Tio kaŭzas, ke multaj maraj estaĵoj aŭ mortas aŭ ŝanĝas sian migradan vojon. La neordinara metea fenomeno estas no-

Forpreno de forĵetajo en rivero



mata de la lokanoj El Nino, signifanta en la hispana lingvo "la knabo".

En la lastaj jaroj, "la knabo" foje refoje petolis: 1982-1983 la Norda Ameriko suferis neordinaran varmegon someron kaj neĝegan vintron; sekegeco daŭre senbridis en Afriko, Oceanio kaj la Suda Azio. 1997-1998 diluvo, uragano, pluvego, hajlo kaj neĝego detruis sen-nombrajn domojn de Ekvadoro, Peruo kaj Ĉilio; daŭris kelkajn monatojn la arbara incendio de Indonezio; en Aŭstralio la areo de arbaro detruita en incendio estis duobla de tiu de Anglio; kamparanoj de Filipinoj sur la seka kampo surgenuje preĝis al Dio; en Ĉinio la riveroj Yangzi, Nenĵiang, Songhuajiang englutis multajn kampojn kaj vilaĝojn. En 1998 preskaŭ 32 000 homoj de la mondo perdis sian vivon kaj 0.3 miliardo da homoj senhejmiĝis pro naturaj katastrofoj. La ekonomia perdo jam atingis 89 miliardojn da usonaj dolaroj.

Estas ne juste, ke oni atribuis tiujn katastrofojn al "la knabo". Ni prenas Ĉinion kiel ekzemplon. antikve ĉe la supra baseno de Yangzi-rivero prosperis arbaroj, tamen meze de la 19-a jarcento pro rapida multiĝo de loĝantaro, la grandareaj arbaroj malaperis. Forhakinte la arbojn multaj enmigrantoj ekspluatis virgan teron, tamen post 4-5 jaroj pro tio, ke arboj mankas kaj tero estas facile forigebla, nur ŝtonoj restis, do ili refoje migris al nova regiono, denove forhakis arbojn kaj ekspluatis virgan teron. Sabloj kaj tero fluis de la supra baseno al la meza kaj kolektiĝis tie formante malprofundaĵojn aŭ insulojn, sur kiuj kamparanoj terkulturis kaj loĝis. Kiam la rivero inundis, la vilaĝoj sur la rivervojo fariĝis "subakva Pompejo".

Tia tragedio ne estas sola: sude de Saharo sekego longe regas pro senbrida hako de arbaroj. En la pasintaj 20 jaroj la dezerto etendiĝas je 350 kilometroj antaŭen, kaj sennombraj vilaĝoj fariĝis "subsa-



Denseco de loĝantoj

bla Pompejo".

"La knabo" ja estas satano kulturata de la homaro mem, kaj la sinsekvaj katastrofoj estas alarmo al la homaro.

DRASTA REDUKTIĜO DE SPECOJ DE ESTAĴOJ

En la mondo vivas miloj kaj miloj da specoj da animaloj kaj kreskaĵoj, kiuj formas stabilan biosferon. Malaperiĝo de ajna speco kaŭzas pereon de sennombraj koncernaj specoj, tia maligna cirkulado estas ne bridebla. Estas timinde, ke nun perea rapideco de specoj similas al tiu en la perea tempo de dinosaŭroj antaŭ 65 milionoj da jaroj.

Duono de la animaloj vivas en arbaro. Ĉiujare kun reduktiĝo de 10 milionoj da hektaroj da tropika arbaro, 27 mil specoj da animaloj malaperas sur la terglobo. Koncerna internacia organizo publikigis, ke en la lastaj 41 jaroj la rapideco de pereado de animaloj estas 1000-oble pli granda ol la ordinara, ekzemple antaŭ la 19-a jarcento pereis averaĝe unu speco de vertebruloj en unu jarcento, tamen de la 20-a jarcento ĉiujare unu speco de animaloj.

Hodiaŭ la homaro fariĝis detruanto de la naturo: detruis arbaron, ĉasi animalojn, polui la medi-

on... En antikva Afriko, miloj kaj miloj da elefantoj estis breditaj de homoj, sed nun homoj mortigis ilin nur por eburoj. Ankaŭ rinocera korno, tigra ostoj k.s. estas avidataj de homoj. Nun en la mondo restas nur 12 500 rinoceroj de 5 specoj, kaj tigroj — malpli ol 6 000.

Antaŭ 200 jaroj oni kredis, ke fiŝoj estas neelĉerpeblaj. Sed nun eĉ perkoj en la maro de Antarkto jam estis elĉerpitaj de modernaj fiŝŝipoj de diversaj landoj. Meze de la 90-aj jaroj 13 el la 15 fiŝoriĉaj areoj dezertiĝis.

Riveroj estas lulilo de homa civilizacio, sed tiuj "patrinaj riveroj" jam fariĝis plago, ĉar en la riverojn ĉiujare oni verŝis 450 kub-kilometroj da malpura akvo, kio mortigis estaĵojn en la riveroj. En stomako de marbirdoj oni eĉ trovis fajrilon kaj plastajn pecetojn. Monda San-Organizo konigis, ke en la mondo po 8 sekundoj unu infano perdis sian vivon pro malsano kaŭzita de malpura trinkakvo. Kaj 40% da homoj estas en la situacio de manko de akvo. Tial specialistoj antaŭdiris, ke en la 20-a jarcento oni faris militojn pro petrolo, kaj en la venonta jarcento pro trinkakvo.

Rapida multiĝo de homoj, drasta reduktiĝo de arboj kaj animaloj kaj manko de trinkebla akvo — kion oni devas fari antaŭ tiuj problemoj? ■

Respektata doktorino

de ZHANG WEI

FARI la mondon senlepra estis temo de la Internacia Kontraŭlepra Konferenco en Pekino pasintjare. La temo montris bonan deziron de la homoj, kiun la homaro penas realigi en la estonta jarcento. Por tiu celo ĉinino Li Hengying atingis grandan sukceson kaj estis honorita de la konferenco.

S-ino Li antaŭe studis en Usono kaj laboris kiel oficistino en la Monda San-Organizo. Sed antaŭ 40 jaroj ŝi forlasis siajn gepatrojn, kiuj jam fiksloĝiĝis en Usono, kaj revenis hejmlanden. Poste ŝi fariĝis lepro-preventa fakulino.

Lepro atakis ĉefe la provincojn Yunnan, Guizhou kaj Sichuan, sudokcidenta Ĉinio. Antaŭe lepro estis rigardata kiel nekurablebla malsano pro manko de preventaj kaj kuracaj rimedoj. La lepruloj suferis ne nur fizike, sed ankaŭ psike. Tiam kiu lepruliĝis, tiu estis forpelita el la vilaĝo aŭ eĉ brulmortigita aŭ enterigita vive. Post longa tempo aperis pluraj leprulaj vilaĝoj en profundaj montoj. Kvankam la registaro asignis grandan monsumon por kuraci la le-

prulojn kaj multaj el ili komplete resaniĝis, tamen oni daŭre timas lepron.

En 1970 s-ino Li ekkontaktis lepron. Ŝi enloĝiĝis en leprula vilaĝo malproksima kaj tie faris esploradon, kaj poste veturis alilanden kaj tie faris esploradon unu jaron. Komence de la 80-aj jaroj la ĉina registaro promesis fundamente likvidi lepron antaŭ 2000. Por trovi leprulojn en malproksima montaro ŝi longe vivis tie kaj agis kiel ilia amikino. Ŝi etendis sian nudan manon al ili kaj manpremis ilin. Ŝi atente faris al ili fizikan ekzamenon. Iu maljunulo rifuzis medicinaĵon, ŝi donis al li akvon kaj petis lin gluti la medicinaĵon. La lepruloj estis kortuŝitaj kaj nomis ŝin "Nia amata doktorino".

Dum la pasintaj 20 jaroj ŝi postlasis siajn piedsignojn en 59 gubernioj kun alta morbokvanto de lepro. Pro longa vojaĝo diversaj danĝeroj ofte atakis ŝin. Foje ŝi ŝipe veturis al vilaĝo, sed la ŝipo renversiĝis. Oni streĉiĝis, tamen ŝi ridegis: "Ne maltrankviliĝu! Mi, dika kiel pilko, povas flosi sur la akvo." Alifoje pro trafika akcidento rompiĝis ŝiaj klaviklo kaj tri ripoj.

Li Hengying (la tria de dekstre) parolanta kun lepruloj



Li Hengying

Reveninte Pekinon, ŝi enhospitaliĝis, sed ŝi ofte englitis en sian kabineton por analizi la pli ol 200 sango-specimenojn, kiujn ŝi akiris en la leprulaj gubernioj kaj tajpis per la mano nevundita. Poste, kiam aliaj menciis la danĝerojn, ŝi diris: "Fortuno akompanas min, ĉar mia kuraco estas bonfara."

Ŝi ne nur resaniĝis leprulojn en la korpo, sed ankaŭ savis plurajn familiojn el dismembriĝo. Dao Jianxin lepruliĝis tiel, ke liaj membroj misformiĝis kaj lia edzino forlasis lin. S-ino Li komplete resaniĝis lin. Nun Dao jam reedziĝis kaj havas filon. Li ofte diris: "Lepro ŝanĝis min en fantomon, sed d-ino Li faris min normala homo."

La enketo en 1985-1995 montris, ke en la 59 gubernioj helpitaj de la Monda San-Organizo, 8 307 lepruloj estis resanigitaj. Nun la nombro de lepruloj en Ĉinio estas nur ĉ. dek miloj. Ŝia kuracmetodo jam disvastiĝis tra la mondo.

20 jaroj pasis. S-ino Li diris: "Antaŭe mi vizitis leprulajn vilaĝojn pro kuracista devo, sed nun ŝajnas al mi, ke la lepruloj estas intimaj por mi. Mi donas al ili sciojn pri prevento kaj kuraco de la malsano kaj ili plene subtenas min." Por sia kariero la 77-jara d-ino daŭre laboras senlace. ■

Ora sonorilo



La ora sonorilo estas unu el la 16 pecoj de la ora gamosonorilaro farita en 1716 por kortegaj ceremonioj. Iliaj formoj kaj grandecoj estas samaj, sed la dikecoj malsamaj, pro tio ili sonas en malsamaj tonoj.

Ĝi dikas 2.1 centimetrojn, altas 21.2 centimetrojn, pezas 24.5 kilogramojn, kaj la anso formita el du drakoj altas 6 centimetrojn. Ĝi estas barelforma, ĝiaj supro kaj apertura rando estas ebenaj. Sur la faco gravuriĝas drakoj en nuboj, la dato de ĝia pretigo kaj ĝia nomo "Huangzhong".



Kiosko

Foto de LIU SIGONG

ISSN 0032-4361



9 770032 436009

世界语《中国报道》一九九九年第六期
(本刊代号：二一九一五) 国内统一刊号：CN11-1339/G2